

LA ONDO de Esperanto

Internacia sendependa magazino en Esperanto

Respondas la urbestro
de la Esperanto-urbo

La Akademio renoviĝis

Esperanto-biblioteko
en Bjalistoko fondita

Petrolo-sabloj timigas
Eŭropon

Esperantaj ludoj rete

Antaŭ cent jaroj

“Aloha Oe”

de Jack London

Andreas Künzli pri

“Kiel akvo de l' rivero”

Rusa Antologio:

Miĥail Lermontov

Du novaj konkursoj de

“La Ondo”



2010

6

LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2010. №6 (188)

Aperas ĉiumonate

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov

Refondita en 1991

Eldonas kaj administras Halina Gorecka

Redaktas Aleksander Korĵenkov

Konstantaj kunlaborantoj Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Andrzej Sochacki

Adreso RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

Telefona (4012) 656033

Elektronika poŝto sezonoj@kanet.ru

Hejmpaĝo <http://Esperanto.Org/Ondo>

Abontarifo por 2010

Internacia tarifo: 38 eŭroj

Orienteŭropa tarifo: 20 eŭroj

Ruslanda tarifo: 590 rubloj

Pollanda tarifo: 60 zlotoj

Aerpoŝta aldono: 5 eŭroj

Elektronika abono (pdf): 12 eŭroj por ĉiuj landoj

Perantoj vidu la liston sur la 27a paĝo de la februara Ondo.

Konto ĉe UEA avko-u

Recenzoj Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

Eldonkvanto 600 ekzempleroj

Anonctarifo

Plena paĝo: 100 EUR (3000 rubloj)

Duona paĝo: 60 EUR (1800 rubloj)

Kvarona paĝo: 35 EUR (1000 rubloj)

Okona paĝo: 20 EUR (600 rubloj)

Malpligrandaj: 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm²

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripetito.

Donacoj La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

Represoj Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2010.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2010, №6 (188).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 17 мая 2010 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

Parolas Kaliningrado! — Ĉi tiuj vortoj eksonis la 5an de februaro 2008 en la unua Kaliningrada podkasto, kaj la 12an de januaro 2009 ili la 19an fojon malfermis la sonprogramon de *Radio Esperanto*. Sed sekvis unujara paŭzo, kaŭzita de aĉeto de pli potenca komputilo, kiu montriĝis ankaŭ tro brua por sonregistrado. Fine, ni ekhavis tekokomputilon, kiu ebligis al ni la 7an de marto 2010 ĉi-jara rekomenci niajn elsendojn per la 20a sonprogramo.

Al tiuj, kiuj estas eksterteme, ni klarigu, ke podkastado (angle: *podcasting*) estas pretigado kaj reta distribuado de publikaj sondokumentoj, alivorte, podkasto. Podkasto estas riceveblaj per tiucelaj programoj, ekzemple, *iTunes*, kiuj mem “kaptas” novajn elsendojn el via abonlisto. Jen granda avantaĝo kompare kun radio — oni ne devas atendi fiksitan tempon, la podkasto mem venas en vian komputilon, kaj vi povas aŭskulti ilin en oportuna tempo, per via komputilo aŭ per portebla sonaŭskultilo.

Ekde la relanĉo ni publikigis kvar podkasto. En la mallonga 20a programo (14 minutoj kaj 20 sekundoj) Aleksander senkulpiĝas pro la mutado, kaj en la tradicia Kaliningradan felietono *Okcidente de Ruslando* Halina rakontas pri la “provizora” nuligo de la trajna komunikado inter Kaliningrado kaj Pollando/Germanio. Sekvas prezentado de la februara *Ondo* kaj la redakcia kolumno el ĝi. La restartan programon finas la kanzono “Jen” de Alejandro Cossavella (Argentino).

Tri semajnojn poste, la 28an de marto, *Radio Esperanto* eksonis la 21an fojon en pli kutimaj daŭro (27m37s) kaj temaro. Post *Okcidente de Ruslando* (escepte dediĉita al jar-kunveno de la Kaliningradaj esperantistoj), oni konatiĝas kun la marta *Ondo*, aŭskultas Esperanto-novaĵojn, poemon de Puŝkin kaj prezenton de *Metropoliteno*; fine Miĥail Povorin kantas sian kanzonon “Bariloj kaj truoj”.

Nia 22a podkasto (35m42s) enmondigis je la Kosmotaĝo, la 12an de aprilo. En ĝi Halina leĝere parolas pri siaj aventuraj pendoladoj inter poŝtejoj kaj doganejoj pro ricevo de libropako el Svislando (neniam sendu al ni registritajn libropakojn sen interkonsento!). Post rakonto pri du Kaliningradaj ekspozicioj, Esperanto-novaĵoj kaj aprila *Ondo*, surprize eksonas la voĉo de Paul Gubbins, kiu legas sian prezenton de la romano *Kredu min, sinjorino!* La programon kronas la kanzono *Pli bonas* kiun Miĥail Povorin registris kun Nataŝa Gerlaĥ, interŝanĝante voĉpartiojn pere de la reto inter Moskvo kaj Svedio kie Nataŝa loĝas.

Ankaŭ la 23a programo de *Radio Esperanto* (33m22s) aperis en festa taĝo — la 1an de majo. Kvankam ankaŭ ĝin komencas la vortoj “Parolas Kaliningrado”, eble “Parolas Svetlogorsk” estus pli adekvate, ĉar ĝi estis registrita en la banurbo Svetlogorsk/Rauschen, kie ni pasigis la festan semajnfino. En ĝi oni ekscias pri la festivalo *Rusa muziko ĉe la Balta Maro*, pri la maja *Ondo* kaj pri niaj redakciaj novaĵoj. István Ertl daŭrigas la ekzemplon de Gubbins kaj mem legas sian prezenton de *Vojaĝo al Kazohinio*, kaj fine la afrika bando *Konga Espero* kantas en Esperanto.

Aŭskulti niajn elsendojn rete: <http://la-ondo.rpod.ru/>; aŭ senpage abonu ilin: <http://la-ondo.rpod.ru/rss.xml>.

Ĝis reaŭdo!

HaGo

AlKo

Sur la kovropaĝo estas Agnieszka Rzetelska, kiu komence de majo iĝis prezidanto de la Pola Esperanto-Junularo. (*Fotis Marian Zdankowski*)

La urbestro de la Esperanto-urbo respondas

Unu el plej multe labor-sarĝitaj loĝantoj de la germana urbo Herzberg am Harz certe estas ĝia urbestro, Gerhard Walter (GW). Tamen nia Herzberga korespondantino, Małgosia Komarnicka (MK), sukcesis konvinki lin, por ke li trovu iom da tempo kaj respondu kelkajn demandojn speciale por *La Ondo de Esperanto*.

Ja Gerhard Walter estas la unua urbestro de la unua kaj dume sola Esperanto-urbo en la mondo. Ne nur tio distingas lin. Li estas ĉiam ridetanta, bonkora, amikema; dum oficialaj renkontiĝoj li ĉiam trovas tempon por interparoleti preskaŭ kun ĉiu, sed la plej grava estas tio, ke li lernas Esperanton kaj por la esperantistoj li ĉiam trovas tempon. La unuaj demandoj koncernis Esperanton.

MK: Ĉu vi scias, ke vi estas escepta kaj netipa urbestro? Precipe pro tio, ke vi tiel malferme apogas kaj subtenas Esperanton?

GW: Jes. Mi estas simila al Donkiĥoto. Mi rapide rimarkis, ke multaj inter miaj gekolegoj ne ekkonis, ke Esperanto estas bonŝanco.

MK: Kial vi lernas Esperanton?

GW: Ĉar Herzbergaj gecivitanoj tre engaĝite instruas tiun lingvon kaj propagandas ĝin. Kiel urbestro mi devas tion montri.

MK: Lernante Esperanton vi iagrade jam konas ĝiajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Bonvolu nomi ilin.

GW: La avantaĝo: rapide lernebla. La malavantaĝo: tro multaj antaŭjuĝoj, kaj mankas helpantoj en signifa pozicio.

MK: Ĉu laŭ vi ekzistas perspektivoj por Esperanto en la estonteco? Ĉu Pollando povas plenumi ian specialan rolon en ĝia evoluigo?

GW: Mi pensas, ke Esperanto ankaŭ post jardekoj restos "hobio". Imagu, ke la britoj devus morgaŭ veturi dekstraflanke... La strukturoj estas tro firmaj. En Pollando tio povus esti pli facila ol en Germanio. Tie oni povus laŭ mia opinio "ordoni" ke Esperanto estas io pozitiva. Kelkfoje oni devas devigi la homojn al sia feliĉo. Tio estas malfacila en Germanio.

MK: Ĉu laŭ vi Esperanto povus esti "pontolingvo" inter homoj de diversaj nacioj?

GW: Komprenoble. Tion mi travivas ĉiutage en Herzberg. Mi ne estus povinta imagi antaŭ kelkaj jaroj, ke, ekzemple, homoj el Azio kun homoj el Afriko interkomunikiĝas per Esperanto, sed ne angle!

MK: Kio, laŭ via opinio, devus esti la plej grava atuto de internacia lingvo?

GW: Mi argumentas tiel, ke Esperanto estas tre facile lernebla — precipe de tiuj, kiuj jam lernis la latinan, anglan aŭ francan.



MK: Ĉu laŭ vi la ideo de internacia lingvo proksimiganta homojn estas tro idealisma en nia hodiaŭa mondo?

GW: Jes — tiel estas.

MK: Kiel la urbestro de la Esperanto-urbo ofte vi renkontiĝas kun esperantistoj. Kio precipe post tiuj renkontiĝoj restas en via memoro?

GW: Tre amindaj, tre engaĝitaj homoj — bedaŭrinde tro malmultaj en gvidaj pozicioj.

MK: En la Eŭropa Parlamento estas forta malinklino al Esperanto kiel komuna eŭropa lingvo, kvankam Esperanto montriĝis efika internacia komunikrimedo. Kio laŭ vi estas la kaŭzo de tia sinteno?

GW: Ĉiu homo konservas tion, kion li lernis — de kio li dependas. Nur kiam Esperanto en lernejoj estos instruata kiel vera alternativo, la ideo havos ŝancon.

MK: La ideo de Esperanto estas iasence idealisma. Unuopaj homoj per tiu idealismo efektivas siajn revojn. Politikistoj kaj lingvaj fakuloj trovas argumentojn kontraŭ Esperanto. Kial laŭ vi ne ekzistas konsento pri la valoroj de Esperanto kiel lingvo?

GW: Kiel mi jam diris, ĉiu homo pensas unue pri si mem. Kial ne ĉiuj lernu unue la anglan, hispanan aŭ francan. Esperanto nuntempe ne havas proparolantajn lobiistojn.

Ĉar la urbestro de Herzberg havis ankoraŭ iom da tempo, nia korespondantino decidis demandi lin pri kelkaj neesperantaj aferoj, por proksimigi lian silueton al la legantoj.

MK: Kia estas via vivomoto?

GW: Pozitive sinteni — tiam ni (preskaŭ) ĉion sukcesas.

MK: Kiuj estas viaj fortaj kaj malfortaj flankoj?

GW: Miaj fortaj flankoj estas bona sano, bona memoro kaj pozitiva sinteno al la vivo. Miaj malfortaj flankoj estas dominemo, deziro konvinki aliajn; mi malbone aŭskultas.

MK: Ĉu estas io, kion vi atingis pene?

GW: Mezajn aŭ bonajn notojn je mia abiturienta ekzameno (mi estis nur averaĝa).

MK: Vi havas multajn okupojn. Ĉu vi sukcesas akordigi viajn vivojn privatan kaj profesionan?

GW: Nur malfacile. Ju pli longe mi estas urbestro, des pli da taskoj/laboroj atendas min. Tio malutilas al mia liber-tempo kaj sekve al mia familio.

MK: Kio plej bone malstreĉas vin? Kiel vi pasigas vian liberan tempon? Kio estas via hobia?

GW: Antaŭe ripozigis min aŭskultado de melodia, trankviliga muziko, ekzemple, *Amazing Grace* de Judy Collins kaj aliaj.

MK: Ĉu vi scivolemas pri la mondo? Kio plej interesas vin en ĉi tiu mondo?

GW: Mi estas iom Faŭsto, tamen preskaŭ mi ne forlasas mian ĉirkaŭaĵon. Domaĝe, se oni estas nur mallonge gasto en ĉi tiu mondo...

MK: Ĉu vi ŝatas legi librojn? Kiun libron vi laste tralegis? Kiun libron vi kunportus al neloĝata insulo?

GW: Mi ne legas librojn. Mia literaturo estas leĝoj, dekretoj, protokoloj ktp. Sur neloĝata insulo estus tro multe da laboro.

MK: Mi ege dankas, ke vi tiom da tempo dediĉis por nia interparolado. Mi deziras al vi sukcesojn!

Intervjuis

Małgosia Komarnicka

(kiu dum la tuta intervjuo sentis sin kvaŭzaŭ amike interparolanta kun sia delonga konato, sed ne kun grava persono — tia estas la urbestro de la Esperanto-urbo Herzberg am Harz, sinjoro Gerhard Walter.)

Spite la cindran nubon

Pli ol 70 partoprenantoj vizitis la 32an Malferman Tagon de la Centra Oficejo de UEA la 17an de aprilo. Multaj estis malhelpitaj pro nuligitaj flugoj aŭ fortimigitaj de plenplenaj trajnoj sekve de la haltigo de aertrafiko pro la cindra nuboj elspuita de islanda vulkano.

La ĉefgasto estis d-ro Mark Fettes, asista profesoro pri edukado en la Universitato Simon Fraser en Vankuvero. Fettes prelegis dufoje pri Esperanto kaj la monda eduka problemoj, klarigante sian ideon pri UEA kiel unuavice eduka organizaĵo.

Nora Caragea legis el *Pacrakontoj*, kiu estas jam la kvara libro de la germana aŭtorino Gudrun Pausewang en ŝia traduko. Rob Keetlaer prezentis sian retejon pri proverboj, www.proverbaro.net. Sian agadon prezentis ankaŭ TEJO kaj Esperanto@Interreto (E@I), dum komitatano Johan Derks diskutigis interesitojn pri la utilo de reta decidfarado. Ankaŭ pluraj filmoj estis montritaj.

La Libroservo vendis sume por 2107,52 eŭroj. La ĉefa furoraĵo (8 ekz.) estis la nova *English-Esperanto-English Dictionary* de John Wells.

Sekvatage la Centra Oficejo de UEA gastigis seminarieton pri informado, kiun kunorganizis E@I kaj UEA. Grandan parton de ĝi oni dediĉis al la prezentado de la portalo aktuale.info, kiu informos pri Esperanto kaj pri Esperanta agado en diversaj lingvoj. La portalo estas preparata de E@I kun subteno de Esperantic Studies Foundation.

D-ro Mark Fettes parolis en la seminario pri la evoluigo de la informado pri Esperanto. En la Reta Kinejo de UEA eblas vidi 45-minutan filmon, kiu konsistas el la kontribuo de Fettes kaj el la posta diskuto.

<http://www.ipernity.com/doc/97850/7843129>

La venonta Malferma Tago estos la 27an de novembro 2010.

GK UEA

**La Esperanto-kulturpre-
mion, kiun la FAME-fondaĵo
kaj la urbo Aalen asignas
ĉiun duan jaron pro subten-
ado kaj stimulado de inter-
naciaj kompreniloj, en la
2010a jaro ricevos Halina
Gorecka kaj Aleksander
Korĵenkov (Ruslando).**



Varia temaro en la Havano IKU

Internacia Kongresa Universitato allogas en la lastaj jaroj multe da prelegproponoj de universitatoj kaj aliaj fakuloj. Por prelegi en ĝia 63a sesio dum la 95a Universala Kongreso de Esperanto en Havano (17–24 jul 2010) estis 20 kandidatoj, t.e. pli ol duoblo de la naŭ prelegoj, kiuj konsistigos la programon de IKU. Ĉar aldone la kvalito de la proponoj estis tre alta, la tasko de la speciala UEA-komisiono, kiu prijuĝis ilin, ne estis facila. La finanĉo decidon faris la Estraro de UEA, kiu plene sekvis la rekomendon de la komisiono.

En Havano okazos jenaj naŭ IKU-prelegoj, kiuj traktos plej diversajn temojn: kulturo, literaturo, lingvo, esperantologio, fiziko, medio kaj medicino:

Duncan Charters: “Etnaj kaj preteretnaj kulturoj”

Jane Edwards: “Kultura dinamiko de la kuba diasporo”

Maritza Gutiérrez: “Lingva diverseco en Latinameriko”

Hidenori Kadoya: “Lingvaj rajtoj en la Esperanto-movado”

Stefan MacGill: “Esperanto-didaktiko”

Orlando Raola: “Neŭtrona difrakto”

Humphrey Tonkin: “Shakespeare en multlingva mondo”

Rafaela Uruĉa: “Protektado de la medio”

José Antonio Vergara: Medicinaj sistemoj en interkultura dialogo.

Kiel la temoj sugestas, pluraj prelegoj rilatas al la temo de la 95a UK, Interproksimigo de kulturoj. La prelegoj de Charters, Tonkin kaj Uruĉa estos samtempe kursoj de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS). La dumkongresaj AIS-kursoj konsistas el tri prelegoj, el kiuj la IKU-prelego estos la unua, sekvata de du daŭrigaj prelegoj por pli profunda traktado de la temo. La kunlaboro inter IKU kaj AIS komenciĝis en 1995.

La prelegotekstoj aperos en la t.n. IKU-libro, lanĉota en la UK. Kelkaj antaŭaj IKU-libroj estas ankoraŭ haveblaj ĉe la Libroservo de UEA.

GK UEA

Akademio: Triono (re)elektita

Okazis ela reelektado de triono de la akademianoj laŭ la Statuto de la Akademio de Esperanto.

Ne rekandidatis Aŝvinikumar, Gersi Alfredo Bays, André Cherpillod, Flavio Rebelo kaj Trevor Steele. Iliajn lokojn prenis la novaj akademianoj Marcos Cramer, Lena Karpunina, Stano Marček, Paŭlo Moĵajev kaj Alexander Shlafer.

Estis reelektitaj Vilmos Benczik, Probal Dasgupta, Miguel Gutierrez Aduriz, Boris Kolker, Erich-Dieter Krause, Li Shijun, Carlo Minnaja, Humphrey Tonkin, Bertilo Wennergren, Yamasaki Seikō.

Pro la ĵus okazinta forpaso de akademiano Maŭro La Torre, nun la Akademio konsistas el 44 membroj:

Perla Ari Martinelli
Marc Bavant
Vilmos Benczik
Gerrit Berveling
Marjorie Boulton
Renato Corsetti
Marcos Cramer
Dao Anh Kha
Probal Dasgupta
Michel Duc Goninaz
Lena Karpunina
Gbeglo Koffi
Paul Gubbins
Miguel Gutiérrez Aduriz
Ottó Haszpra
Christer Kiselman
Boris Kolker
Ilona Koutny
Katalin Kováts
Erich-Dieter Krause
Li Shijun
Jouko Lindstedt
François Lo Jacomo
Anna Löwenstein
Ma Young-tae
Carmel Mallia
Stano Marček
Geraldo Mattos Gomes dos Santos
Carlo Minnaja
Paŭlo Moĵajev
Brian Moon
Barbara Pietrzak
Sergio Pokrovskij
Otto Prytz
Baldur Ragnarsson
Francisko Simonnet
Alexander Shlafer
Saka Tadasi
Humphrey Tonkin
Amri Wandel
John Wells
Bertilo Wennergren
Xie Jū-ming
Yamasaki Seikō

La estraro de la Akademio



Varsovio: Łukasz Żebrowski (LukiZ) invitas kongresumi. (Fotis Andrzej Sochacki)

PEJ raportas, planas, elektas...

En la verda, nord-orienta kvartalo de Varsovio, trideko da partoprenantoj pasigis semajnfinojn (30 apr – 3 maj) en la kunveno de Pola Esperanto-Junularo (PEJ).

La programon inaŭguris Łukasz Żebrowski per raporto pri la agado de la estraro en la oficperiodo 2008–2010. En tiu tempo PEJ realigis kelkajn grandajn projektojn, el kiuj unuavice menciindas la Internacia Junulara Kongreso de TEJO organizita en 2009 kune kun Ĉeĥa kaj Germana Esperanto-Junularoj en Liberec. Same gravis la fondo de la Junulara Esperanto-Semajno (JES), kiu kreigis dank' al kuniĝo de novjaraj Ago-Semajno (de PEJ kaj *Varsovia Vento*) kaj Internacia Seminario (de GEJ). Atenton meritas ankaŭ la furoraj esperantaĵoj de PEJ: T-ĉemizo *Lingva revolucio* kaj botelmalfermilo *Esperanto — Probably the best language in the world*.

Sed ne ĉio iris laŭplane, kaj la sekva estraro dum la du venontaj jaroj devos doni apartan atenton al la loka agado.

Realigon de tiu kaj aliaj taskoj surprenis ses novelektitaj estraranoj, La prezidantino fariĝis Agnieszka Rzetelska, kiu en la antaŭa estraro rolis kiel la vicprezidantino. La ĝisnuna prezidanto, Łukasz Żebrowski prizorgos informadan kampon. El la antaŭa estraro restis ankaŭ Leszek Dobrowolski, kiu daŭre estos kasisto de PEJ. Tute novaj estraranoj estas Zuzanna Samborska (vicprezidantino) kaj Natalia Antolak (sekretario). Pri landa agado respondecos Przemek Wierzbowski, kiu estis estrarano de PEJ dum 2006–2008. La estraron membras do egale tri viroj kaj tri virinoj, kaj same egale tri novaj kaj tri plu oficantaj aktivuloj.

Okazis ankaŭ du programeroj dediĉitaj al JES. La unua prezentis la organizan flankon de JES al tiuj, kiuj ankoraŭ ne membras en la teamo. La dua estis kutima laborkunsido de la organiza komitato. Oni klopodis krei ideojn por ŝanĝi emblemon de PEJ. Tio ĉi estis realigita per preparado de grafitiaj ŝablonoj. La programero, krom multo da amuzo, donis konkretajn rezultojn, kiuj estos evoluigataj.

Ne eblas ne menci i la debuton de la Varsovia kabaredo *La oraj pantalonoj en arbustoj*. Tiu ĉi nova grupo prezentis skeĉojn en Esperanto kaj en la pola. Ĉiuj vesperoj finiĝis per etosplena kradrostando en la Verdejo de la *Varsovia Vento*.

Łukasz Żebrowski

La unua publika Esperanto-biblioteko ekfunkciis en Pollando

12 maj en Bjalistoko ekfunkciis la unua en Pollando publika Esperanta biblioteko. Ĝi estas filio №14 de la Podlaha Libraro kaj troviĝas en la Centro Zamenhof, strato Warszawska 19.

Blank-ruĝan rubandon komune fortranĉis la vicmarŝalo de la Podlaha vojevodio Jacek Piorunek, la vicurbestro de Bjalistoko Aleksander Sosna, la direktoro de la Podlaha Libraro Jan Leończuk, la direktorino de Bjalistoka Kulturcentro Grażyna Dworakowska kaj la nova bibliotekistino Elżbieta Karczewska.

Gastoj laŭdis la ideon kaj ĝian sukcesan realigon. Barbara Pietrzak, ĝenerala sekretario de UEA, legis tre varman leteron de Osmo Buller. Robert Kamiński salutis ĉiujn nome de PEA kaj ties prezidantino Halina Komar. Johan Pachter, vicprezidanto de la Berlina Esperanto-Ligo, transdonis salutojn de berlinaj esperantistoj kaj de la urbestro de Berlin-Lichtenberg. Li enmanigis al la direktoro la plej novan eldonon de la germana-esperanta vortaro por la biblioteko. Ankaŭ gastoj el Varsovio, Toruno kaj Lodzo alportis librojn. La solenaĵon partoprenis i.a. la direktoro de la biblioteko de la Pola Akademio de Sciencoj kaj direktoroj de la plej grandaj bibliotekoj en Pollando, Litovio kaj Bjelorusio.

En la ekspozicia salono de la Centro koncertis en Esperanto la juna klezmera kapelo *Young Folk Crew*, kaj la urbestro regaligis la gastojn per grandega torto. La

katalogon de la Esperanto-Libraro oni povas legi ĉe www.ksiaznicapodlaska.pl. Legantoj povas viziti la bibliotekon marde-vendrede ekde 12.30 ĝis 17.30. Proponataj estas libroj por lerni kaj instrui, romanoj, dramoj, poemoj, libroj por infanoj kaj junularo, muzikdiskoj kaj revuoj. Lokaj amaskomunikiloj afable raportis pri la evento.

Ela Karczewska

En la nova biblioteko ankaŭ *La Ondo* estas legebla. (Fotis Ela Karczewska)



Kvinpetalo baldaŭ 25-jara

La kulturcentro Kvinpetalo estas agrabla kampara restadejo en la vilaĝo Bouresse, en okcidenta Francio (proksime de Poitiers), kun ampleksa propra biblioteko. Ĝi konsistas el pluraj malnovaj dometoj, adaptitaj por enhavi kursoĉambrojn, manĝejoj kaj simplajn sed komfortajn dormoĉambrojn. La centron posedas la Societo Yvonne Martinot, kiu ĵus akiris pluan dometon, situantan inter la jam posedataj konstruaĵoj.

La kulturcentro rekomencis siajn aktivaĵojn por la jaro 2010. Fine de februaro okazis staĝo diversnivela (komencantoj, komencintoj, kaj iom pli spertaj homoj), majstre gvidata de Ansofi Markov. Pluraj komencintoj celis trejniĝi por la unuagrada ekzameno, kiun ili efektive trapasis en la fino de la kurso; la preparado estis taŭga, ĉar ĉiuj sukcesis.

En aprilo okazis tute alitipa staĝo — ekologia ĝardenumado. Ĝin gvidis fakulo Bernard Lagrange: temis unuflanke pri teoria lernado, kun klarigo pri metodoj, lernado pri fakaj vortoj, kaj aliflanke pri praktikado, tiel ke la ĝardenaj partoj de Kvinpetalo plibeliĝis per postvintra purigado, organizo de legombedoj kaj kreo de novaj florbudoj, kiuj certe provizos amason da novaj petaloj.

Somere estas planataj staĝoj pri tradukado, preparo al altnivelaj ekzamenoj, praktika turismo (lernado pri ĉiĉeronado, inkluzive de arthistorio kaj trejnado dum vizito de lokaj interesajoj). Okaze de la tradicia muzika staĝo meze de aŭgusto, la Centro festos sian 25-jariĝon.

Claude Nourmont

Subteni Nian Domon en Bosnio

Manko de propra kunvenejo, la plej grava problemo kiun frontas esperantistoj de Sarajevo kaj de Bosnio-Hercegovino dum la lastaj 18 jaroj, estas definitive solvita. Esperanto-Ligo de Bosnio-Hercegovino kun partopreno de deko da siaj membroj kunaĉetis loĝejon en la centro de Sarajevo (str. Kralja Tvrtka 19) kiu servos kiel kunvenejo de lokaj esperantistoj kaj kiel sidejo kaj oficejo de la Ligo.

La aĉetita ejo estas en detruita stato kaj ĝi bezonegas fundan renovigon. La rekonstruajn laborojn oni pritaksas je 15 mil eŭroj. Tiucele la Ligo lanĉis apartan fondaĵon *Nia Domo* por kolekti financajn rimedojn por renovigaj laboroj kaj posta instalado de oficeja ilaro.

Ĝi invitas siajn membrojn, esperantistojn kaj amikojn tra la mondo per modestaj, eĉ simbolaj kontribuoj subteni *Nian Domon*. La kontribuoj estas interalie pageblaj al la banko-kontoj de UEA, kodnumero “elbh-j”.

Antaŭ la kontraŭbosnia agreso en 1992 bosniaj esperantistoj disponis en Sarajevo tri kunvenejoj en la centra kvartalo de la urbo — la oficejo de la Ligo, la kunvenejo de la loka Esperanto-societo kaj la klubejo de la Universitata Esperanto-klubo.

Post la fino de la milito la novaj aŭtoritatoj rifuzis redoni eĉ unu el la ejoj al la Esperanto-organizaĵoj. Tial la aĉetita kunvenejo estas historia evento por la bosnia movado, kiu ĝuste ĉi-jare festas sian centjariĝon.

Vildana Delalić

Brazilo: Trejni kursgvidantojn

La lastan aprilan dimanĉon okazis la 12a Trejnado de Kursgvidantoj de Esperanto. Ĉi-jare ĝi estis organizita de EKOR (Esperantista Kunfratiĝo de Okcidenta Regiono) kaj AERJ (Asocio Esperantista de Rio-de-Janeiro). Partoprenis ĝin en la kolegio Francisko de Asizo en la kvartalo Realengo (Rio-de-Janeiro) ĉirkaŭ 50 gesamideanoj, inter kiuj 22 kandidatiĝis por ekzamenoj.

La Trejnadon malfermis Márcio Nascimento, ĝenerala kunordiganto. Sekvis prelego de la prezidanto de BEL, José Passini “La defioj de la movado rilate al instruado de Esperanto”. Akademiano Geraldo Mattos parolis pri “La malfacileco de la facileco: participoj”.

La unua posttagmeza prelego estis de Francisco Wechsler, 2a Sekretario de BEL, kiu parolis pri la temo “Kiel instrui akuzativon”, la dua prelego de Elmir dos Santos Lima pri “Rimedo por plibonigi nian lingvokapablon”, fine Nazaré Laroca parolis pri la temo “Instruaj teknikoj de fremdaj lingvoj”.

Dum la tagmezaj horoj okazis la parola kaj skriba ekzamenoj. Je la 17a horo, la evento finiĝis per komuna kantado de la himno *La Espero*.

Paulo Roberto De Freitas Carvalho

La afrika kongreso prokrastita

La kongresfako de LF-koop anoncas la prokraston de la Jubilea Afrika Kongreso en Esperanto, planita kiel neesperantista, sed esperantlingva simpozio pri la situacio en Afriko kvindek jarojn post la “printempo de la popoloj” en 1960.

En sia komunikado al la partneraj establoj (precipe TIETO en Togolando) c-ino Mariola Jobin klarigas: “Aŭskultinte viajn opiniojn kaj la opiniojn de la kooperantoj de Literatura Foiro, la kongresfako de LF-koop decidis prokrasti la Jubilean Afrikan Kongreson en Esperanto ĝis dato kaj en loko konvenaj al la nova asocio Unuiĝo de Esperantistoj en Tuta Afriko. La streĉo por la organizado de la 17a Togolanda Esperanto-Kongreso tuj antaŭ JAKE, sed en tute alia urbo, same kiel la zorgoj pro la starigo de sendependa afrika esperanto-movado, kiu jam renkontas bedaŭrindan kontraŭstaron ekster la Pakto, persvadis la Kongresfakon pri la oportuno atendi almenaŭ plian jaron por realigi JAKE”.

Al JAKE jam anoncis sian aliĝon dudeko da eŭropanoj, al kiuj la anticipo de la kotizo estos tuj repagita.

HeKo



Konstanta Esperanto-informejo

En la Esperanto-urbo Herzberg am Harz ĉe la GEA-Filio por Klerigado kaj Kulturo / Esperanto-Centro en Herzberg / Interkultura Centro Herzberg (ICH) funkcias Esperanto-biblioteko kaj arkivejo. Al la biblioteko apartenas pli ol 7 mil libroj, pli ol 13 mil gazetoj, miloj da turismaj broŝuroj, pli ol 500 “sonportiloj”, pli ol 250 filmoj (vidbendoj, DVD kaj KD).

La biblioteko akceptas, kolektas kaj konservas ankaŭ multajn aliajn esperantrilatajn objektojn: filatelajojn, bildkartojn, glumarkojn, pinglojn, kongresinsignojn, afiŝojn, kalendarojn, fotojn, gazetartikolojn, ktp. Heredaĵoj, donacoj estas akurate, bonorde kaj rapide prizorgataj, enkatalogataj, ĉio trovas sian bonan lokon en la ŝrankoj, kolektujoj kaj sur bretoj.

Krom tio en la kastela muzeo de la Esperanto-urbo Herzberg am Harz estas konstanta informloko (ĉ. 30 m²) por informi pri Esperanto. Nun tie ankoraŭ funkcias la riĉ-enhava ekspozicio pri Zamenhof, bone akceptita de la respondeculoj.

La urbo disponigas taŭgan ejon, kaj ni devos plani, prepari kaj konstante prizorgi ĝin, ĉar la muzeo postulas altan aspektnivelon laŭ la nuntempaj muzeaj normoj. La konstanta informejo en publika muzeo ebligas prezenti Esperanton; publike varbi (rete, flugfolio, afiŝe, ktp.); eniri en la kulturkanalojn (gazetaro, muzeogvidlibroj, ktp.); oferti fakajn kaj sciencajn prelegojn, informhorojn, provinstruadon; partopreni ĉe kulturfestoj en la kastelo (Muzeonokto, Tago de Monumento...).

Ni devos ellabori koncepton (enhave, grafike, teknike). Krome ni bezonas allogajn nuntempajn vitroŝrankojn, taŭgajn ekipaĵojn, ktp. Ni petas subtenon, ĉar estas eksterordinara bonŝanco por konstante informi multkanale kaj publike pri Esperanto en Germanio.

Nun la urbo preparas elektronikan gvidsistemon almenaŭ en la germana kaj Esperanto. Dirk Bindmann jam tradukis abundan tekston (pri historio kaj enhavo de la muzeo).

Kiu povas helpi (honorofice) organizi kaj prepari materialojn por la konstanta muzea angulo kaj por laŭokaze ŝanĝendaj ekspozicioj? Laŭeble aliaj kunhelpantoj asistu ankaŭ ĉe esploraj laboroj en la biblioteko, gazetarkivo, informado, ktp.

**Petro Zilvar, Harald Mantz,
Zsófia Kóródy**



Esperanto-budo en Munkeno (Fritz Hilpert)

Ne nur promenado

8 maj en la poŝtoŝtanco ĉe Goetheplaco en Munkeno Karlheinz Steiger salutis la kunvenintojn kaj rakontis pri la historio de la kvartalo Ludwigsvorstadt.

La promeno unue gvidis al la Esperanto-placo. Tie Fritz Hilpert klarigis la historion de la placo. Post unu jaro, la 7an de aŭgusto, oni povos festi la 60-jariĝon de ĉi tiu plej frekventata Esperanto-placo en la mondo.

La kulturpromeno daŭris tra la klinika kvartalo, al Paulspreĝejo kaj fine al EineWeltHaus. Ĉeestis la promenadon ankaŭ la aŭtoro kaj reĝisoro Ze do Rock kaj la vicprezidantino de la Germana-Brazila Kulturasocio.

13–15 maj komenciĝis en Munkeno informado pri Esperanto kadre de la foiro *Ekumena Eklezia Tago* kun ĉ. 150 mil partoprenantoj. Apud la informbudo de esperantistaj kristanoj pasis multaj gravuloj, inkluzive de Angela Merkel. La esperantista magiisto Triksini prezentis sian spektaklon *Mirakloj el kvin kontinentoj* sur la scenejo *Agora*.

Fritz Hilpert

Prezidanto kunlaboris kun Stasi

La lasta prezidanto de la Esperanto-Asocio en GDR, la konata lingvisto Ronald Löttsch, dum jardekoj sekrete kunlaboris kun la ministerio pri ŝtata sekureco, Stasi.

La informo iĝis konata en Germanio meze de marto, lige kun la kandidatigo de lia edzino Gesine Löttsch al alta posteno en la Maldekstra partio de Germanio. Laŭ informoj de germanaj gazetoj, Ronald Löttsch dum pli ol dudek jaroj havis entute pli ol cent renkontigojn kun kunlaborantoj de Stasi, ĉefe por transdoni informojn pri siaj kolegoj.

Laŭ Libera Folio

Ponta Festo ĉe la limo

Je la unuamaja festo denove okazis komuna Ponta Festo en la apudlimaj urboj Frankfurto (Germanio) kaj Słubice (Pollando). Komenciĝis la urba rondiro ĉe la stacidomo, kie la ĉeestantoj eksciis iom pri Frankfurto kaj pri la historio de fervojo kaj stacidomo. Post tio ni komune iris al la hotelo “Malnova Odro” por trinki iomete. La plua vojo kondukis nin super la insulo Ziegenwerder laŭ la riverbordo al la Odra promenejo, de kie ni atingis la ejon de la urba Ponta Festo.

En la restoracio *Kafejo ĉe Kleistparko* okazis eta publika estrarkunsido de la Esperanto-Asocio Berlino-Brandenburgio, en kiu estis decidite inviti la Germanan kaj Polan Esperanto-Kongresojn al Berlino en la jaro 2012.

Post la estrarkunsido kaj vizito de la fama Kleist-muzeo, sekvis en la Pollanda flanko de la ponto la vespera programero kun komuna babilado, manĝado kaj trinkado en ĉina restoracio de Słubice ĝis la 22a horo.

Ronald Schindler

Nova vortaro je la jarkunveno

24–25 apr okazis jarkunveno de la Dana Esperanto-Asocio. La unuan tagon Stano Marček prelegis pri didaktiko kaj instruado pere de rekta metodo kaj pri la fabeloj de Andersen, kiujn li eldonis kiel DVD-serion en traduko de Zamenhof. La duan tagon okazis la ĝenerala kunveno, kun reelektado de la estraro: Ileana Schröder (prezidanto), Finn Østerbæk (vicprezidanto), Arne Casper (kasisto), Jens S.Larsen (sekretario), Bent Jensenius, Ole Therkelsen kaj Regin Larsen (estraranoj).

En la jarkunveno aperis nova vortaro dana-Esperanto kun 34.015 vortoj.

Ileana Schröder

Esperanto centjara en Oradea

Pli ol 50 partoprenantoj ariĝis 7–9 maj en Oradea (Rumanio) por festi la centjariĝon de la loka Esperanto-Asocio. Ili venis el dek urboj de Rumanio kaj el la najbara Hungario. La festa programo enhavis ekspozicion, historian simpozion kaj sociajn programerojn.

Antaŭ la ekspozicio estis prezentita prelego pri la cent jaroj de la loka Esperanto-movado. La ekspozicio estis malfermita en la moderna Distrikta Biblioteko. En kvar vitraj ujoj oni prezentis diversajn relikvojn: malnovajn lernolibrojn (la plej malnova el la jaro 1898), vortarojn, jarlibrojn, dokumentojn, diplomojn, fotojn, ktp — propraĵoj de lokaj samideanoj. En la teretaĝo estis ekspoziciataj dek du grandaj anonctabuloj kun grandigitaj dokumentoj kaj fotoj kaj la artikolon de iama loka ĵurnalo, kiu anoncis la 10an de majo 1910 la estiĝon de la Esperanto-grupo *La Verda Standardo*. Tie funkciis ankaŭ granda projekcia aparato, prezentanta serion de fotografajoj, faritaj okaze de la sukcesa 14a IMEK (medicinista kongreso), organizita en Oradea en 2003.

Post la malfermo de la ekspozicio sekvis bonetosa, komuna vespermanĝo, kiu ludis ankaŭ la rolon de interkona renkontiĝo.

Dum la duataga simpozio oni prezentis sep diversajn prelegojn, pri la malnova kaj proksima historio de la Esperanto-movado en la urbo kaj en la ĉirkaŭaj urbetoj kaj vilaĝoj. Jen kelkaj temoj: La vivo de Zamenhof, Amikaj rilatoj inter la Esperanto-grupoj el urboj Oradea kaj Eger (Hungario), Esperanto-movado en urbo Salonta k.a.

Post la simpozio, sabate posttagmeze la ĉeestantoj vizitis la plej gravajn kaj belajn konstruaĵojn de la urbo, kiel la barokstilan “triojon” de la romkatalika eklezio: la Baziliko, la Episkopa Palaco kaj la t.n. Koridoro de kanonikoj, ĉiuj tri estis konstruitaj en la 18a jarcento. Dimanĉe oni vizitis aliajn partojn de la urbo (precipe la centron de la urbo kun multaj novart-stilaj konstruaĵoj). Kelkaj gastoj vojaĝis al la proksima fama, varmakva ban- kaj ripozloko Felix, eĉ banis sin.

Estis granda ĝojo por la organizantoj, ke ili povis festi kune kun aliurbaj, eĉ alilandaj gesamideanoj, tiel gravan datrevenon. Krome la kunveno estis bona okazo interŝanĝi diversajn spertojn, opiniojn pri la esperantismo kaj pri iaj ajn temoj, zorgoj.

Stefano Budaházy



Aroma Jalto-2010

La ĉi-jaran festivalon *Aroma Jalto*, komence de majo en Jalto (Krimeo, Ukrainio), partoprenis 66 samideanoj el ses landoj. La plej multenombra grupo reprezentis ne Pollandon, kiel antaŭe, sed Jalton. Vintre al la elementa kurso de la Jalta Esperanto-klubo venis ĉirkaŭ 40 komencantoj, kaj antaŭ la *Aroma Jalto* multaj el ili sukcese ekzameniĝis.

La festivalo pasis sukcese. Inter la seriozaj programeroj estis kunveno de aktivuloj, ULEJ-Kongreso, ULEI-kunveno. Kadre de la “Universitato” prelegis Wolf Krüger, Ben Indestege, Jefim Zajdman, Tatjana Auderskaja kaj la nobbakita akademiano Pavel Moĵaev.

Tradicie okazis kursoj, ekskursoj, piedmarŝoj, distraj vesperoj kaj nokta kamenumo kun komuna legado por dezirantoj.

Volodimir Hordijenko

Ĉinio: plia universitata kurso

La 7an de majo en la ĉina urbo Kanton estis inaŭgurita kurso de Esperanto en la universitato Baiyun.

Dum la malfermo — kiun partoprenis studentoj, esperantistoj kaj reprezentantoj de la Universitato Baiyun — du gestudentoj laŭtlegis salutmesaĝojn. Mallonge prelegis Petro Ye (vicprezidanto de la Kantona Esperanto-Asocio), Augusto Casquero (Hispanio) kaj Dai Shengqiao (profesoro de la universitato, organizanto de la kurso kaj instruisto).

La ĉeestantoj kaj gelernantoj montris grandan entuziasmon pri la Internacia Lingvo kaj komune kantis la himnon *La Espero*.

Augusto Casquero

La sesa en Iberio

La 6a Iberia Renkontiĝo, evento kiun organizas de antaŭ kelkaj jaroj junularo de Iberia duoninsulo, okazis aprile en Almagro, fama historia urbeto. Ĉi-jare estis vico de junularo de Hispana Esperanto-Federacio, kiu kun helpo de loka asocio Esperantista Manĉa Asocio, organizis semajnfinan renkontiĝon. En ĝi kuniĝis ĉirkaŭ 40 homoj el la duoninsulo kaj kelkaj alilandanoj.

En la palaco de la grafoj Valparaiso okazis la diversaj aktoj de la programo: prezento de la hispanlingva versio de la libro *Kronikoj de la Hispana esperantista laborista movado* de Antonio Marco Botella, debato pri lingvaj rajtoj, kiu ebligis paroli pri konkretaj lingvaj problemoj, ludoj, kaj tiel plu.

Estis rimarkinda la vizito al fama teatrejo de la 17a jarcento, kiu estis deklarita Nacia Monumento en la jaro 1955. Tie la partoprenantoj spektis teatraĵon, kiu klarigis kiel funkciis tiaj teatrejoj dum la ora epoko de la hispana literaturo, kiam la verkado de teatraĵoj estis bunta kaj vasta. Post la teatrejo oni vizitis la urbon, ekkonis la diversajn palacojn kaj eksciis pri la historio de la urbo.

Dum la lasta tago oni vizitis la naciajn parkon Las Tablas de Daimiel, kie estas tre valora humidaĵo, bedaŭrinde tre damaĝita lasttempe pro la maldiligenta ago de la homo. Feliĉe la esperantistoj povis ĝui la belecon danke al la abundaj pluvoj de la antaŭa monato. Post la vizito al la humidaĵo okazis tradicia tagmanĝo por ĝui la lastajn momentojn de la renkontiĝo. Kun bedaŭro, sed kun emo por renkontiĝi denove post unu jaro, la partoprenantoj adiaŭis ĝis sekva Iberia Renkontiĝo, kiu okazos en Katalunio.

Juan Trenado

Radio: problemoj en Varsovio

Laŭ la decido de la superuloj de Pola Radio (PR), ekde 17 maj la sola salajrata laboranto de ĝia Esperanto-redakcio, Gabi Kosiarska, kaj kelkaj aliaj dungitoj okupiĝos pri ŝanĝoj en la ret-portalo de PR. La funkciado de la Esperanta servo estas frostigita por la nedefinita daŭro de tiu nova tasko. En la paĝaro de la Esperanto-redakcio aperados ripetoj de programeroj. Oni flegas la esperon, ke post kelka tempo ĉiuj, kiuj estis komisiitaj pri la nova tasko, povos reveni al siaj kutimaj okupoj, interalie Gabi Kosiarska al la Esperanta sekcio. **GK UEA**



La unua ĉi-jara intensa kurso en la Esperanto-Domo de Yatugatake

En la Esperanto-Domo de Yatugatake 17–18 apr okazis intensa kurso organizita de Kantoo-Esperanto-Ligo, kies teritorio estas Tokio kaj la ĉirkaŭaj gubernioj.

Partoprenis en ĝi 18 homoj en la kursoj komencanta kaj konversacia. La unuan klason gvidis prof. Sasaki Terhiro kaj la duan Saliĥ Zakirov kaj Hori Jasuo. Ambaŭ estis tre interesaj kaj enhavriĉaj, kaj ĉiuj estis kontentaj. Vespere Saliĥ Zakirov, tataro el Baŝkirio (Ruslando), prelegis pri sia lando ne konata al japanoj. Poste en la Gaja Vespere talentuloj montris sian arton: buŝharpon, muzikludon per plasta botelo, prestidigiton, fingrofajfadon, kaj pli poste ni kune ĝuis bingon kun multaj premioj.

En la dua tago, en belega vetero ni praktikis tajĉĉuanon kaj promenis en la kamparo. Ni povis vidi la monton Fuji. Je la 9a komenciĝis la samaj kursoj, kaj je la 12a ni adiaŭis la Esperanto-domon.

Hori Jasuo

Tutlanda seminario dum la Ora Semajno en Japanio

En Japanio kelkaj tagoj fine de aprilo kaj komence de majo estas konataj kiel Ora Semajno, ĉar sinsekvas minimume tri-kvar kalendaraj feriotagoj. Jam pli ol kvardek jarojn dum tiu semajno japanaj esperantistoj organizas tutlandan seminarion.

Ĉi-jare la seminario okazis 2–4 maj ĉe OVTA (Overseas Vocational Training Association) en la urbo Tiba, ne tre malproksime de Tokio, kun 48 partoprenantoj. Japana Esperanto-Instituto (JEI), kun la helpo de loka Tiba Esperanto-Klubo, organizis la seminarion.

La seminario ĝenerale konsistas el ĉ. 12-hora lernado, fakkunsido(j), ekzamenoj kaj distra programo. Partoprenantoj elektas taŭgan klason el la kvin diversnivelaĵoj kaj diversenhavaj klasoj: “Ni al kutimiĝu konversacion” (baza/elementa de Murata Kazuyo), “Lerni Esperanton per oreloj kaj per buŝo” (elementa/mezgrada de Huzimaki Ken’iti), “ABC por legi Esperantajn poemojn” (elementa/mezgrada de Tutui Kazuyuki), “Ne tiel sed tiel ĉi — por pli esperanteca esprimo” (mezgrada/supera de Bill Mak) kaj “Mi opinias ĉi tiel — pri tio kaj ĉi tio” (supera).

Ĉiu klaso havas 6-13 lernantojn kaj ili foje intense foje ĝoje lernis dum la lecionoj. Posttagmeze en la dua tago okazis du japanlingvaj fakkunsidoj; “Kiel fariĝi pli kapablaj en Esperanto? Viaj antaŭuloj parolos pri siaj spertoj” kaj “Enkonduko en la songo-analizon”.

Okazis Ekzameno de JEI kaj la Nova Testa, kaj ekzameniĝis tri por la kvargrada ekzameno kaj ses por la Nova Testa. Ekzameno de JEI dividiĝas en kvar gradojn kaj konsistas el skriba kaj paroliga partoj; sed la Nova Testa havas alian karakteron. Okazas almenaŭ dufoje ĉiujare tiuj ekzamenoj en Japanio.

Dum la Gaja Vespere en la dua tago kelkaj prezentis bildteatraĵon kaj kantadon, kaj ni kune kantis kaj ĝuis aŭskcion de Tahira Masako. Estas ĝojinde, ke troviĝis inter la partoprenantoj kvar 20-jaruloj. Ni tiom kutimiĝas al la manko de junuloj, ke ili donis al ni iom da kuraĝo.

Isikawa Tiekō

Unufraze

★ Renato Corsetti 14 maj reprezentis UEA en la 38a Kunveno k Konferenca Tago de Asocio de Lingvotestistoj en Eŭropo (ALTE) en Romo. (GK UEA)

★ Avantaĝoj de Eo en la lerneja instruado estis la ĉeftemo de la televida programo *Fogadóora* (Konsultado kun gepatroj) elsendita 24 apr de la Hungaria kanalo MTV-1. (Landa Agado)

★ La finalon de la 9a simfonio de Beethoveno prezentis 9 maj en Bjalistoko la orkestro k koruso de la Podlaĥia Filharmonio k Operejo kun la kantado de la *Odo al la ĝojo* en Eo. (Joanna F-Ch)

★ 5 maj en Taĝikistano helpe de subvencio de KAEM aperis la unua E-lernolibro por taĝikoj (konciza gramatiko, konversaciado, vortaroj k.a.), verkita de Firdaus Ŝukurov. (Landa Agado)

★ Kunlabore kun la Komisiono de UEA pri Azia E-Movado, la ĉina e-isto Li Jianhui en majo venis al Birmo; en la subŝtato Keqin li renkontiĝis kun edukministro, post kio komenciĝis E-kurso por oficistoj de la loka registaro. (Landa Agado)

★ Komence de majo Ulrich Matthias gvidis E-kurseton por 21 partoprenantoj ĉe privata lernejo en Wiesbaden (Germanio); krome ĉ. 60 lernejoj ĉeestis prezentadon de Eo fare de kursanoj. (U.M.)

★ Je la 16a de majo al la 95a UK en Havano aliĝis 862 personoj el 59 landoj; plej multe el Kubo 120, Francio 108, Japanio 73, Germanio 66, Brazilo 62, Italio 41, Nederlando 32, Belgio 24, Pollando 22, Meksiko 19. (uea.org)

★ En la 62a Internacia Fervoja E-Kongreso, okazinta en majo 2010 en Sofio kun 136 partoprenantoj, s-ino Rodica Todor, profesia psikologo ĉe la fervojkompanio en Rumanio, estis elektita kiel prezidanto de IFEF. (HeKo)

★ Kadre de la voĉdonado pri Komitatoj B de UEA, je 10 maj revenis al la Centra Oficejo de UEA pli ol 1000 kovertoj kun balotiloj, t.e. 21% de la aktuala nombro de individuaj membroj kotizintaj por la nuna jaro. (GK UEA)

★ 1 maj 2010 nova E-volontulo Guy Jonston el Britujo komencis sian restadon en Bjalistoko; li eklaboris anstataŭ Chris Chazarein, kiu revenis al Francio. (Ela Karczewska)

★ La komitato de la Irana E-Asocio nomumis la novan estraron de IREA: Keyhan Sayadpour (prezidanto), Mahmud Mirbozorgi (vicprezidanto k kaskisto), Nayereh Ebrahimpour (sekretario).



Petrolo-sabloj timigas Eŭropon

Dafydd ab Iago el Bruselo

En 2009 la Eŭropa Unio decidis kontraŭstari forcej-efikajn gasojn. La timo, ĉiam pli reala, estas ke tutmondaj emisioj de karbona dioksido de fosiliaj fueloj, ĉirkaŭ 40% pli altaj ol tiuj en 1990, signifos ke la klimata varmiĝo superos 2 C°.

“Eĉ se la emisiado estos stabiligata je la hodiaŭa nivelo, nur 20 jaroj da plia emisiado donos 25-procentan probablecon, ke la varmiĝo superos 2 C°. Ĉiu jaro da prokrasto pliiĝos la ŝancojn ke varmiĝo superos 2 C°”, — analizas Manfred Westermayer surbaze de laboro de grupo da renomaj sciencistoj. Por kontraŭstari tion, EU pli frue promesis malaltigi CO₂-emisiojn je 30%. Ĝi starigis leĝojn ne nur por redukti la emisiojn sed ankaŭ por altigi la uzadon de renovigeblaj energioj.

La edukministro kontraŭas

Post renkontiĝo de Cyrille Décou-
ture, prezidanto de la asocio *Esperanto-80* kun Olivier Jardé, franca deputito de la partio Nouveau Centre, tiu ĉi faris demandon al la ministro de la edukado de Francio, Luc Chatel, pri la enkonduk-
eblo de Esperanto en lernejoj.

La edukministro jene respondis:

«Esperanto estas lingvo portanta la belan idealon de frateco kaj neŭtraleco. Parolata de milionoj da uzantoj disaj en la mondo, Esperanto ne kunigas, bedaŭrinde, la necesajn kondiĉojn por esti celo de instituciita lerneja instruado. Instrui Esperanton cele al klerigo de la parolantoj, kiuj povu komuniki internacie, implicas, ke tiu lingvo estu sufiĉe

disvastigata en la mondo por ebligi efektivan kaj praktikan uzadon; disponu je oficiala statuto; estu portanta kulturon kaj riĉan kulturan heredan posedaĵon.

Esperanto ne estas nuntempe en stato konkurenci iujn grandajn internaciajn lingvojn, kiaj estas la angla, la araba, la hispana, la rusa kaj la franca, kies regado vere montriĝas pli esenca ol tiu de Esperanto; same sur la terenoj de ekonomio, de diplomatio, de turismo, kiom de esplorado. Krome, Esperanto ne estas ankaŭ nuntempe agnoskata kiel laborlingvo de la grandaj internaciaj organizaĵoj. La loko de la kulturo, ĉefa en la instruado de la vivantaj lingvoj en Francio, cetere trudas, ke la instruata lingvo, fremda aŭ regiona, estu portanta riĉan kaj vivantan kulturan heredaĵon.

Spite al la agnosko de la danĝero, aktivuloj timas ke nenio vere ŝanĝiĝas. Emisioj iom malkreskas en Eŭropo kaj Usono, sed plejparte pro la malfortiĝo de la ekonomio. Pli grave, grandaj nafto-kompanioj preparas relanĉon de la ekonomio pere de la esplorado de novaj sed dubindaj nafto-rimedo.

Eĉ la katastrofa tralikiĝo de nafto al la maro proksime al Usono ne haltigas planojn pligrandigi produktadon de nafto el petrolo-sabloj — unu el la plej diskutindaj manieroj akiri nafton. Restas espero, ke eble nun, post la katastrofo en Usono, oni pli pripensados la danĝerojn. La 4an de majo eĉ la usona prezidento Barack Obama agnoskis, ke la tralikiĝo de nafto en la Meksika Golfo estas “grava defio”. Obama nun promesas, ke la Usona registaro uzos ĉiujn eblajn rimedojn por kontroli kaj superregi la influojn, alportitajn de la tralikiĝo de nafto.

Norde de Usono, en Kanado, la registaro fortigas la produktadon de petrolo-sabloj. Tio estas nafto, trovita en duon-solida formo miksitaj kun sablo kaj akvo. “Eŭropo riskas fariĝi medi-aĉulo se ĝi ne efike agados kontraŭ la eniro de petrolo-sabla nafto al eŭropaj merkatoj”, — diras Darek Urbaniak el la asocio *Amikoj de la Tero*.

“La media damaĝo kaŭzita de petrolo-sabloj estas ekster Eŭropo, sed la spuro de detruo kondukas al ĝia pordo”, — Urbaniak argumentas ke la esploro de petrolo-sabloj ne nur pligrandigas la klimatan krizon, sed ankaŭ malhelpas al Eŭropo redukti la emisiadon.

Laŭ nova raporto de *Amikoj de la Tero*, Kanado gvidas la evoluon de novaj teknikoj rilate al petrolo-sabloj. Sed la nova produkto-maniero de nafto internaciigigas. Ankaŭ la Eŭropaj nafto-kompanioj BP, Shell, Total kaj ENI komencas esplori por petrolo-sabloj tutmonde, specife en Kongo, Venezuelo, Madagaskaro, Ruslando, Jordano kaj Egiptio. Ne nur la medio suferas — la petrolo-sabloj ofte signifas katastrofon kaj finon por lokaj komunumoj.

Laŭ Urbaniak, la nuntempaj eŭropaj leĝoj ne sufiĉe agnoskas la danĝeron de nafto-produktoj kun ege alta nivelo de emisiado. Nafto el petrolo-sabloj povas kaŭzi emisiadon de forcej-efikaj gasoj de trioble ĝis kvinoble pli ol la normala nafto.

La raporto de *Amikoj de la Tero* atentigas pri la negativaj efikoj pri arbaroj, grandega kvanto de toksaj elĵetaĵoj kaj malŝparo de akvo. Se Eŭropo nun komencos grandskale aĉeti nafton el petrolo-sabloj ĝi nuligos la bonan efikon de emisio-reduktado kaj kreskanta uzado de la renovigeblaj energioj.

Necesas por la lernanto meti en la perspektivo sian propran kulturon rilate al tiu de la aliulo por kompreni, kio konsistigas ĉiun en sia diferenco. Necesas ankaŭ konsciigi la lernanton pri lingvaj variaĵoj (akĉentoj, loka dialekto, registro de lingvo...), kiuj faras la “salon” de la lingvo. Ĝuste la aliro al la komplekseco de kulturo kaj al la interna riĉeco de lingvo igas la lernadon aparte motiviga por la lernantoj. Esperanto, kiu ne disponas ankoraŭ je statuto de la patrina lingvo, konstruas nuntempe al si propran kulturon, kiu restas ankoraŭ tre juna. Tamen, nenio kontraŭstaras al tio ke, de nun, la lernestablejoj, kiuj dezirus tion, starigu inicadon al Esperanto en la kadro de lokaj ĉirkaŭedukaj aktivajoj».

Henri Masson

La fenomeno Blanke

La maja kajero de *La Ondo de Esperanto* faras al mi tro da honoro publikigante (p. 12) eĉ tri reagojn al mia recenzo pri la “tonkinalo”.

Kompreneble kolego Camacho povas aldoni sian nomon al tiuj de la *expressis verbis* cititaj, ankaŭ geBlanke, Gacond kaj Kiselman, kies kontribuoj ja legindas, sed forprenis de Tonkin la *ius primae noctis*... Eble oni elaŭskultos la peton de la povra Barandovská-Frank ke “iu festlibreto tute ne malplaĉus al” ŝi. Jen kompil’ por GIL...

Detlev reludas sian rolon de komunista moral-teologo kaj forgalopis kun sia filistreco ne povante substancigi la aserton, ke “per mikso de ignoroj, distordoj, ofendoj kaj aliaj impertinentaĵoj” mi prezentis la libron. Gurdi stulton ne transformas ĝin en saĝon...

Kaj cetera: ne mi, sed Tonkin parolis pri la neceso “dresi” Dasgupta...

Plej interesa estis la detalo en punkto 4 de Detlev: laŭ ĝi mia recenzo el 2010 estas la kaŭzo kial en 1995 (pli ĝuste: per letero de 1995-12-07) GIL, t.e. ties (tiama) vicprezidanto, Prof. Dr. Ronald Löttsch, komunikis al mi, ke la estraro de GIL malakceptis mian aliĝ-peton, sam-tempe sciigante, ke ne ekzistas akcepto-devo kaj ke laŭstatute la decido ne estas motivigenda.

Temas pri la sama Ronald Löttsch, pri kiu la novaĵ-magazino *Spiegel* ĉi-marte raportis, ke li estis Stasi-agento... Sed sendube li posedis “la kapablo(n) ĝentile kaj senkonflikte kunlabori kun aliaj kolegoj”. Efektive Detlev pravas, ke “la sviso [t.e. Tazio Carlevaro — R.H.] estas psikiatro”. Eble eĉ ĉi fenomenon li sciis ekspliki.

Reinhard Haupenthal

Publika letero al Reinhard Haupenthal

<...> mi ne diskutos la libron pri Humphrey Tonkin. Mi devas protesti kontraŭ via translimiĝo de la scienco de psikoanalizo kaj la misuzo de terminoj en kalumnio, respektive, ofenda maniero. Vi arogas juĝi pri homoj, kvazaŭ vi estus ĉefinkviziciisto!

Mi esperas, ke ĉio okazis nekonscie, sed mi devas atentigi la legantojn de viaj arogantaj-orgojlaj replikoj, ke temas pri venenaj sagoj, kiujn vi pafas el via memfosita kavo, uzante al vi fremdan sciencan. Ĉar vi ne prijuĝas atingiĝojn kaj sciencajn verkojn de homoj, sed la homojn mem, mi permesas al mi samon fari por vi.

Unue, vi ne priatentis, ke la scienco pri la nekonscienco por la spertulo reale aperas en siaj eldiroj kaj agoj. Ne vane Jerzy Lec, konata pola verkisto, diris: “Homoj, ne malkaŝu viajn sonĝojn. Povos okazi, ke la Freudanoj transprenus la regadan potencon”. Kaj la majstro de la analizo, Freud, mem esprimis la potencon de la nekonsciaĵo per la vortoj: “Ni ne estas la mastro en nia mensa domo”.

Mi unue pripensis pri via pseŭdonima epigrafo “Iltis”, kiun vi elektis kiam vi malaperis en via kavo (“Iltis” Esperante putoro, kaj latine *Mustela putorius*). Pro la ŝanĝoj en la vivomedioj de industriiĝinta mondo, la putoro retiriĝis al nokta aktivado, kie li postlasas en bienoj kaj staloj mortigitajn bestojn, kaj pro fiodoro oni titolis ĝin “mefitigulo”, kion oni povus traduki per la germana vorto *Stänker*, kaj laŭ Brehms Tierleben, la fiodoro helpas la malaperintan beston, ke oni ne forgesu ĝin.

Due, mi okupiĝis pri la epiteto “uretreca” kiun vi ligas kun “narcisismo”. Tio estas viaj fantaziaĵoj, kiuj science estas multe diskutataj, sed ĝis nun ne estas pruvoj. Kontraŭe al viaj asertoj, la uretrece formitaj homoj vivas kvazaŭ kaŝe kaj ofte estas membroj en fajrobrigadoj. Ili kaŝe ekas fajreton (germane: *Zündeler*) por poste per propra urino estingi ĝin, kio donas al ili seksan kontentiĝon. Kiam la fajreto pligrandiĝas, tiam ili estas inter la unuaj en la fajrobrigado, kiu alvenos por profesie estingi. Do, ĉiukaze ili ne estas aktivaj krimuloj, sed estas envere retiriĝemaj personoj, kiuj nur en siaj kavoj serĉas reputacion. Ĉu tiaj ecoj ne pli konvenas por epiteto vin? La rubaĵaj, venenaj sagoj ja pli tipaj estas por vi ol por la preleganta movada aktivisto Tonkin.

Tion, kion vi nuntempe praktikas, estas pregenitala, sensekse ejakulo de nematura knabo! Estonte lasu tiajn eksperimentojn, revenu al la Esperanto-Komunumo.

Tion tutkore deziras al vi

Hans Konrad Eichhorn

Opinio el Ĉeĥio

Mi dankas pro via interesa kaj valora magazino *La Ondo de Esperanto*, kiun mi regule ricevas ĉiumonate. En la 3a kaj 4a n-roj min precipe interesis la studoj de Aleksander Korĵenkov pri la patro de la kreinto de Esperanto, Mark Fabianoviĉ Zamenhof. Tiuj artikoloj estas gravaj por bone kompreni la socian pozicion de la familio, en kiu kreskis kaj evoluis Ludoviko Lazaro Zamenhof.

En la 3a numero sur la paĝo 10 kaptis mian atenton la foto-grafaĵo, sur kiu Max Kaŝparŭ, Petro Chrdle kaj Pavel Rak tostas super la nova libro *Desegnita humuro* de Pavel Rak. Mi ĉestis tiun solenaĵon, kaj unufoje mi vidis kaj aŭdis paroli Esperante la psiĥiatron Kaŝparŭ. Li apartenas al tiuj personoj, kiuj havas aliron en la Ĉeĥan Radion kaj ankaŭ en la televidon, kaj tio estas tre bona promeso por Esperanto. Mi aŭskultas regule liajn diskutojn en la radio la unuan mardon de monato antaŭtagmeze kaj ripete antaŭnoktomeze. Krome, en la Paska Lundo vespere li havis apartan duonhoran intervjuon pri IKUE kaj pri la katolika Esperanto-movado.

Jiří Patera

La 15an de aprilo 2010 en Barcelono forpasis

Manuel Casanoves i Casals (1927–2010)

kataluna katolika klaretana pastro, eminenta kataluna intelektulo, defendanto de la homaj rajtoj, la unua hispania membro de Amnestio Internacia kaj la unua prezidanto de ties hispania filio (1978), la unua prezidanto de Kataluna Esperanto-Asocio (1982–1986), la unua prezidanto de la restarigitaj Internaciaj Floraj Ludoj (1978), aŭtoro de pluraj fakaj verkoj.

La 20an de aprilo 2010 en Rimini forpasis

Duilio Magnani (1928–2010)

sacerdoto ekde 1953 kaj paroĥestro ĝis 2003. Esperantisto ekde 1969, li aktivis en Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), kiun li prezidis dum 1979–1995 kaj atingis agnoskon de IKUE fare de la Sankta Seĝo, aprobon de la Esperanta Meslibro kaj la enkondukon de salutvortoj en Esperanto fare de la Papo je Kristnasko kaj Pasko. Li estis Honora prezidanto de IKUE, Honora Membro de UEA, laŭreato de Premio Onisaburo Deguĉi (2007).

Ni funebras kaj kondolencas.



Utopia In Four Movements

Monda premiero de la filmo *Utopia in Four Movements* (Utopio en kvar movimentoj) okazis en la ĉi-jara filmfestivalo *Sundance*. Tiu ĉi unika dokumenta filmprezento estis parte financita el subvencio de Esperantic Studies Foundation (ESF).

Sub direkto de la filmisto Sam Green, kiu estis proponita por la Akademia Premio (Academy Award), la filmo celas dokumenti la historion de la utopia impulso en la moderna epoko. Ĝia unua kazoprezento, aŭ movimento, pritraktas esploron de la historio, valoroj kaj idealoj de la planlingvo Esperanto. Postaj movimentoj fokusiĝas je la senfina optimismo de usona ekzilito en Kubo, la aktuala ekonomia eksplodo en Ĉinio kaj ĝiaj efikoj je la enloĝantoj de tiu lando, kaj la deziro de iuj personoj doni al homaj postrestaĵoj dignan enterigon.

La verko estas unika inter dokumentaj filmoj en tio, ke ĝi enhavas vivan rakontadon de la direktoro mem kaj muzikan akompanon, kiu ankaŭ estas ludata vive.

La novaĵa retejo Huffington Post komentis, ke Utopio estas “la plej engaĝa ekranigo de la tuta festivalo [*Sundance* 2010] [ĝi estis] komplete emociiga”.

Vidu reklamfilmeton: <http://vimeo.com/10903101>.

ESF

Granda artikolo pri Zamenhof en Pollando

En la serioza Pollanda semajna revuo *Polityka* (2010, №16) la 17an de aprilo aperis dupaĝa artikolo pri Esperanto, objektive verkita.

Maria Majerczak



Fariĝu herzbergano

Mi jam kelkfoje priskribis Esperantajn eventojn en Herzberg am Harz — la Esperanto-urbo, sed nun mi deziras rakonti al vi pri eventoj, preparitaj ĉefe por mi aŭ pere de mi.

Ĉiumerkrede mi ĉeestas kurson de la germana lingvo. Mi ŝatas ĉi tiujn renkontiĝojn, en kiuj mi ekkonas kulturon de miaj turkaj amikinoj, kun kiuj mi ekzercas la germanan lingvon. Dum niaj renkontiĝoj ĉiam estas varma turka teo kaj io dolĉa.

Intage unu el miaj turkaj amikinoj invitis min al matenmanĝo. Estis bela travivaĵo: dekkelkaj virinoj ĉe abundhava tablo gaje babiladis, absolute ne rimarkante la diferencojn kulturajn kaj religiajn. Nur mia vestaĵo diferencigis min de ili.

Tiaj renkontiĝoj konvinkas min, ke la Zamenhofaj ideoj vivas, kaj homoj povas interkompreniĝi sen antaŭjuĝoj. Mi devas aldoni, ke la *turka matenmanĝo* estis ne nur abunda sed ankaŭ tre bongusta kaj, ĉar mi estis petita gustumi ĉiujn pladojn, mi dum la sekva semajno preskaŭ ne manĝis...

Kelkajn tagojn poste kune ni preparis ŝildojn kun niaj nomoj kaj pendigis ilin sur la Arbo de Amikeco en la ĝardeno de la asocio *Zukunftswerkstatt*. Ĉi tiu kutimo tiel plaĉis al mi, ke mi proponis prepari nomŝildojn en Esperanto-kurso kaj komune pendigi ilin sur la arbo kaj tiel bela ŝildo kun la nomo Esperanto pendas sur la Arbo de Amikeco.

En Herzberg mi amikiĝis kun multaj homoj, kaj ili ofte invitas min al si preparante bongustan manĝaĵon aŭ ekskursojn, ke mi iom ekkonu ilian belan landon. Responde mi preparis *polan vespermanĝon* por miaj multaj geamikoj. Nia renkontiĝo estis ankaŭ bona reklamo de mia lando, des pli, ke en ĝi mia lernantino Gisela bele prezentis sin pole. Amika etoso akompanis nin dum la tuta renkontiĝo, kiu daŭris ĝis mateno...

Ĉi tion ankaŭ vi povas sperti, sufiĉas viziti la Esperanto-urbon. Kompreneble, ne sufiĉas resti en la urbo nur dum unu tago aŭ unu semajno. Venu ĉi tien, kiel mi, volontulino; aŭ fariĝu herzbergano, aĉetinte ĉi tie (tre malmultekoste) domon. Herzberg bezonas esperantistojn, kiuj ĉie interkompreniĝos per Esperanto. Gravas, ke Esperanto sonu en la tuta urbo, ĉar nur tiam loĝantoj sentos bezonon lerni la lingvon.

Mi kun germanaj Esperantistoj interparolas ne germane, sed Esperante sur la stratoj, en vendejoj, restoracioj... Homoj scivoleme demandas en kiu lingvo vi parolas, kaj surpriziĝas kiam ili ekscias, ke ni interparolas esperante. Ja kutime eksterlandanoj konas almenaŭ kelkdek vortojn angle, germane aŭ france por interkompreniĝi, kaj mankas bezono lerni Esperanton. Kiam mi demandas: “Ĉu vi lernas Esperanton, se klientoj uzus nur ĝin”, la respondo ĉiam estas jesa. La restoraciistoj kaj vendistoj en ĉi tiu situacio volonte pendigus en videbla loko la ŝildon “Ĉi tie oni parolas Esperante”. Sed nun ĉi tiu ŝildo estas nur ĉe la ginsengo-butiko sur la ĉefstrato de la urbo.

Baldaŭ en Herzberg okazos kelkaj gravaj Esperanto-aranĝoj. Uzu en ili la lingvon Esperanto, eĉ konante la lingvon de la loĝantoj. Ni helpu al lokaj Esperanto-aktivuloj, ke la unua urbo en la mondo kun la oficiala titolo “Esperanto-urbo” fariĝu vera Esperanto-urbo, en kiu ne nur kelkaj lokaj Esperantistoj kaj urbestro parolas Esperante.

Małgosia Komarnicka

✉ DE-37412 Herzberg/Harz Grubenhagenstr. 6

✉ esperanto-zentrum@web.de

<http://www.herzberg.de>, <http://ic-herzberg.de>

KOMPUTILE

Esperantaj ludoj en la interreto

La ĉiumonatan komputilan rubrikon ni ĉi-foje ŝatus riĉigi per kolekto de Esperantaj komputilaj ludoj. Iom post iom alvenas somero, kaj oni havas feriojn, libertempojn ktp. Kaze de malpli bona vetero aŭ simple dum iuj liberaj minutoj (ekzemple, atendante trajnon, flugon) vi povas distriĝi kaj amuziĝi ankaŭ ludante komputilajn ludojn en Esperanto. Jen speciale por vi — riĉa, aktuala kolekto, kompilita de nun haveblaj ludoj kun etaj klarigoj.

LINGVAJ LUDOJ

Samopiniuloj [samopiniuloj.esperanto-jeunes.org] estas simpla ĉiutaga interreta ludo por serĉi similajn vortojn.

Kelkajn interagajn lingvolernajn ludojn proponas **lernu!**: [lernu.net/lernado/ludoj].

Lingvolernajn ekzercojn eblas trovi ankaŭ ĉe **Edukado.net**: [edukado.net/?elementId=148&kategorio=8].

Ekzistas multaj kolektoj de esperantaj **krucenigoj**: [ophicinadigital.com/all/ai_kruce.htm], [krucenigoj.tripod.com], [koplushia.tripod.com/Krucvort-Enigoj].

Pendumito [krucenigoj.tripod.com/pendumito.htm] estas esperanta versio de la konata ludo Hangman.

Litertriso [www012.upp.so-net.ne.jp/klivo/litertriso] kaj **Vortaris** [members.fortunecity.com/megaribi/VORTARIS.htm] estas lingvoludoj, inspiritaj de Tetris.

Lingva labirinto [e-novosti.info/forumo/viewtopic.php?p=18870] kreas fadenojn el parencaj vortoj pri sama temo.

ENIGMO [pagesperso-orange.fr/la-vortaro/uenigmo.html] estas komputila divenludo kun enigmoj pri diversaj temoj.

Pluraj komputilaj ludoj okupiĝas pri **kreado de vortoj** el literoj: [foessmeier.name/reinhard/primi/lit/apl/padoj2].

En la **Ĉapelludo** [www012.upp.so-net.ne.jp/klivo/chapel-ludo] oni devas aldoni ĉapelojn super ĝustajn literojn en esperanta teksto.

En **Kriptogramo** [web.archive.org/web/20050221225631/http://esperanto.nu/kripto/plifruaj.html] literoj anstataŭas aliajn literojn.

La programo **Anagramoj** [argilo.net/anagramoj] produktas ĉiujn anagramojn de la ricevita vorto.

La **Ŝablona Serĉilo** [krucenigoj.tripod.com/shasero.htm] helpas krei krucenigojn.

INTERKULTURAJ LUDOJ

Instruan metodon bazitan sur interkulturaj ludoj proponas la paĝaro **Interkulturo**: [interkulturo.net/metodiko/ludi_kaj_konkludi.php], [interkulturo.net/metodiko/ekzercoj.php].

KOMPUTILAJ LUDOJ



Batalo por Vesnot' [wesnoth.org] estas laŭvica komputila strategia ludo en fantasta medio, tradukita en Esperanton: [eo.wikipedia.org/wiki/Battle_for_Wesnoth].

Cantr II [cantr.net/?l=8] estas interreta rolludo, kiu havas celon simuli socion. Ekzistas oficiala Esperanto-versio: [eo.wikipedia.org/wiki/Cantr_II].

La ludo **Maniac Mansion Deluxe** [eo.wikipedia.org/wiki/Maniac_Mansion] estas tradukita en Esperanton kaj senpage elŝutebla.

La malfermfonta arkada ludo **Ri-li** [ri-li.sourceforge.net] estas tradukita en 19 lingvojn, inkluzive Esperanton.

Billy [web.archive.org/web/20021111143528/esperanto.dk/billy/index_eo.html] estas profesie farita senperforta ludo, kiu aperis origine en Esperanto.



La retejo Fabelaj mondoj [fabelo.trovu.com] proponas fabelan ludon **Poma kuko por Halovino**.

Pacmanio [sites.google.com/site/ikojba/pacmanio] estas origine kreita en Esperanto kaj inspirita de la ludo Pacman.

Stelo [sites.google.com/site/ikojba/pacmanio2] estas tute esperantlingva ludo kun verda stelo kiel ĉefrolulo.

TABULLUDOJ, KARTLUDOJ, ENIGMOJ KAJ ALIAJ

Ludanto.org [ludanto.org] enhavas kelkdekon da simplaj ludoj kaj enigmoj.

Pli ol 70 ludojn enhavas la retejo **Ludoj en Esperanto**: [mpovorin.narod.ru/ludoj/ludoj.html].

La ludservilo **BrainKing** [brainking.com], kiu proponas plurajn retajn ludojn, uzeblas en Esperanto.

La kolekto de Java-ludoj **Pepere** [www.pepere.org/ekbrilo-ludoj_25] havas esperantan tradukon.

Eblas ludi **Skrablono** (Scrabble) [skrablo.ikso.net] en Esperanto per interreto kontraŭ alia ludanto aŭ komputilo.

Ekde 1958 ekzistas **Esperanta Ŝak-Ligo Internacia** [groups.yahoo.com/group/esperanta-ŝak-ligo-internacia] kaj kreiĝis pluraj terminaroj pri la ŝakludo [eo.wikipedia.org/wiki/%C5%9Cako] en Esperanto.

Goo [eo.wikipedia.org/wiki/Goo] estas populara inter esperantistoj en Japanio samkiel ekster ĝi. Ekde 1979 ekzistas Esperantista Go-Ligo Internacia kaj laste aperis ankaŭ retaj ludejoj por esperantistoj.

Oni povas lerni pri solvado kaj generado de **Sudoko** en Esperanto: [bertin.ifrance.com/artikol/sudoko/sudoko.htm].

Ekzistas esperantlingva enkonduko al **pokero** [learnlangs.com/pokero] kaj terminaro [kisa.ca/pokero.html] por tiu kartludo.

Iam estis... [eo.wikipedia.org/wiki/Iam_estis...] estas kartludo, en kiu ludantoj komune kreas fabelon.

Okazis provo pri esperantigo de la ludoj **Monopolo** [eo.wikibooks.org/wiki/Monopolo] kaj **Diplomatiko** [jct.tripod.com/Diplomatiko].

Ĉina ŝako [kisa.ca/shako/china.html] estas pli vigla versio de la kutima ŝako.

Ekzistas paĝaro kun esperantlingvaj instrukcioj por **origamio**: [corobu.com].

Haveno [haveno.wiki-site.com] estas loko, kie esperantistoj kune konstruas virtualan mondon.

Pluraj aliaj paĝoj enhavas kolektojn de **diversaj ludoj**: [xtec.cat/~pmarti10/ludejo.htm], [foessmeier.name/reinhard/primi/lit/apl], [arcade.ya.com/zamen/descargasJuegos_Eo.html].

Marek Blahuš

Antaŭ cent jaroj

En la maja Ondo ni aperigis la paroladon de Zamenhof, kiun li diris la 21an de aprilo (Gregorie: la 4an de majo) 1910 en la 1a Ruslanda Esperantista Kongreso en Peterburgo. Nun ni proponas rememorojn de Roman Sakowicz (1888–1969), kiu en 1910 estis Peterburga studento. Poste li iĝis advokato en Pollando kaj estis vicprezidanto de PEA, kiam Esperanto renaskiĝis en Pollando post la dua mondmilito. Estas interese kompari du versiojn de liaj rememoroj: el la jaroj 1951a kaj 1959a.

Kiam mi ricevis la proponon skribi miajn memoraĵojn pri D-ro L. Zamenhof, denove aperis en mia memoro maja mateno antaŭ pli ol kvardek jaroj, kiam en jaro 1910 mi, kiel juna studento kun grupo de aliaj Peterburgaj esperantistoj prepariĝis por renkonti nian Majstron alvenantan Peterburgon por partopreni en la unua tutruslanda Esperanto-kongreso.

Mi estis tiam preskaŭ sesjara esperantisto sed la unuan fojon en mia vivo mi havis la okazon ĉeesti kongreson kaj krom tio vidi, aŭdi kaj kunparoli la aŭtoron de la lingvo. Malgraŭ mia sufiĉe jam longa esperantista vivo mi estis tro juna por esti “*eminentulo*” kaj miaj rememoroj estas nur impresoj de junulo, kiu vivis “*sub la sankta signo de l’ espero*”.

La ĉefa gvidanto de la ruslanda esperantista movado estis en tiu tempo kozaka kapitano Aleksandro Postnikov, energia kaj ambicia prezidanto de la de li mem fondita Ruslanda Esperanto-Asocio. Li organizis tiun ĉi unuan kunvenon de ruslandaj esperantistoj kaj se oni atentis la ne tro fortan situacion de la tiutempa movado, li organizis ĝin kun sufiĉa brilo. Jam ĉe la stacidomo mi kun certa estimo rimarkis elegantan duĉevalan kaleŝon, speciale dungitan por nia Majstro.

Sur la persono kolektiĝis la plej konataj esperantistoj de la tiama ruslanda movado: s-ro Evstifejev, aŭtoro de kelkaj esperantaj lernolibroj kaj propagandaj broŝuroj; s-ro Devjatnin, konata esperanta poeto; s-ro V. Lojko, esperantisto de la dua generacio, sekretario de la freŝe mortinta fama societo “*Espero*”, la unua oficiale registrita societo esperantista al kiu jam en 1892 Zamenhof sendis la unuan esperantlingvan telegramon: “*Benitan komencon kreskantan potencon en floro kaj gloro deziras el koro Zamenhof*”. Tiun ĉi telegramon mi vidis en la arkivo de la societo “*Espero*”.

Starante sur la perono, mi modeste rigardis kiel la eminentuloj ĉirkaŭis la malaltan okulvitran homon en uzita tiam malmola ronda ĉapelo, kiu eliris el dua klaso de la rapida vagonaro. Tiun ĉi homon oni povis tuj ekkoni. Li estis tute simila al multaj fotografajoj aperantaj en esperantistaj gazetoj.

Komenciĝis ĝenerala prezentado: emociigita, unu el la lastaj, mi premis la manon de la Majstro, balbutante salutvortojn. Ĉiuj direktiĝis al la kaleŝo, kaj D-ro Zamenhof, akompanate de S-roj Postnikov, Evstifejev kaj Lojko, ekveturis, Mi havis honoran gardon, biciklante post la kaleŝo. Kondukinte la kaleŝon ĝis la fina celo mi rapidis prepariĝi por la malfermo de la kongreso.

Kiam venis D-ro Zamenhof kaj komencis sian paroladon (kiun vi povas tralegi en lia *Plena Verkaro*) mi ne tro atente aŭskultis la enhavon de la parolado, sed streĉe atentis la parolmanieron, la prononcadon de la aŭtoro de la lingvo. Mi memoras la malfermitan *o*, tute kontraŭan al la, ni diru, germana, gorĝa kaj ronda; *i* ne similan al la malmola okcidenta kaj eĉ pli firman ol la pola *y*; meze molan *l* tute malproksiman de la bulgara malmola sono de tiu ĉi litero.

Sed super ĉio estis la beleco kaj precizeco de la formo.

Sonis la plej eleganta esperanta stilo, kiun mi aŭdis en mia vivo. D-ro Zamenhof estis eble la sola aŭtoro (el multaj aŭtoroj de universalaj lingvoj) kiu perfekte posedis la kreitan lingvon. Mi ne bezonas laŭdi la ĉarmon de la lingvo uzita de D-ro Zamenhof, sed mi volas substreki la senton de certeco, ke ĉiu vorto estis ĝuste uzita. D-ro Zamenhof estis vera majstro de sia lingvo.

Alian “*materian*” memoraĵon mi konservis dum longa tempo post la vizito: la cigaredo, per kiu D-ro Zamenhof regalis min!

Sed nun, grizhara maljunulo, mi bedaŭras, ke mi ne vokis tiam, kiel iu granda poeto: “*Momento haltu, estas vi belega!*” (*Esperanto*, 1951, №12, p. 295–296.)

... Postnikov sukcesis aranĝi la unuan tutruslandan Esperanto-kongreson en Peterburgo kun ĉeesto de d-ro Zamenhof. Tiutempe mi estis jam delegito de UEA, nomita de neforgesbla Hodler, kaj kun kelkaj aliaj samideanoj mi venis renkonti d-ron Zamenhof ĉe la stacidomo.

La unuan fojon mi vidis nian Majstron. Li aspektis preskaŭ same, kiel ni vidis lin fotografita: malalta, kun tiu konata malmola, nigra ĉapelo, tre modesta homo, li tuj konkeris la korojn de la samideanoj. Por Zamenhof estis preta malnovstila kaleŝo kun du ĉevaloj, kiu veturigis la Majstron kun kelkaj eminentuloj al hotelo. Mi, kiel delegito de UEA, postsekvis biciklante, sed por turni atenton de la Majstro al mi, pedalante pli vigle mi alproksimiĝis al d-ro Zamenhof kaj demandis: “*Ĉu vi havas iajn ordonojn por la delegito de UEA?*” Zamenhof havis neniajn ordonojn por delegito de UEA, sed mi restis tre kontenta, opiniante, ke mi sukcese ludis mian gravan delegitan rolon.

Dum malfermo de la kongreso Zamenhof faris grandan paroladon — vi povas ĝin legi en la “*Originala verkaro*”, sed min interesis ne la enhavo de la parolado, sed la prononcado.

Kiam mi legis raportojn pri la unua internacia kongreso en Bulonjo, mirigis min, ke la tuta unua kunsido estis dediĉita nur al demandoj de prononcado: Zamenhof klarigis al la kongresanoj, kiamaniere oni devas prononci literojn kaj vortojn en Esperanto.

Mi kun granda streĉo aŭskultis la prononcadon de nia lingvo en la buŝo de ĝia aŭtoro. Mi memoras, ke estis klara influo de la rusa elparolado, precipe en la litero “*i*”, sed la ĝenerala moligo de Esperanto-sono al mi tre plaĉis.

La salonego, kun granda Esperanto-standardo, estis plenkona, venis multaj gapuloj kaj interesiĝis aŭdi kiel sonas tiu nekonata “*artefarita*” lingvo kaj kiel aspektas ĝia aŭtoro.

Bedaŭrinde Zamenhof ne partoprenis aliajn kunvenojn de la kongreso, kiuj okazis en la salonoj de “*nobela domo*”. Duan fojon mi vidis lin denove en la stacidomo, forveturantan. Estis jam pli granda grupo de adiaŭantoj. Kiam la rapida vagonaro ekmoviĝis, Zamenhof estis tre mirigita, ke du junaj samideanoj kune kun li eniris en la vagonon: mi kaj la alia, jam forpasinta, samideano.

Ni decidis akompani la Majstron ĝis la unua haltiĝo kaj la vojaĝo daŭris pli ol unu horon. En la malhela lumo de kandelo (rusaj vagonaroj tiam ne havis gason nek elektran lumon) ni vigle babilis kaj mi memoras, ke mi demandis la Majstron, ĉu estas vera jena okazintaĵo dum la Bulonja kongreso, pri kiu mi legis en Esperanto-gazeto: Zamenhof, aĉetante dum la kongreso gazeton ĉe franca bubo, alparolis lin france, sed la bubo ekkriis: “*sinjoro, parolu Esperante!*” Zamenhof, ridetante respondis al mi, ke tio estas bonega gazeta “*anaso*”.

La tempo rapide forflugis kaj, kiam ni adiaŭis, mi vidis, ke Zamenhof estis tre kontenta pro nia akompanado. (*Pola Esperantisto*, 1959, №6, p. 6–7.)

Aloha Oe

de Jack London



Neniam estas tiaj foriroj kiel tiuj de la doko de Honolulo. La grandioza transporta ŝipo restis plenvapora, preta ekveturi. Mil homoj estis sur la ferdekoj; kvin mil staris sur la varfo. Supren kaj suben la longan pasejon iris indiĝenaj geprincoj, sukerreĝoj, kaj la altaj funkciuloj de la Teritorio. Pretere, en longaj linioj, ordigataj de la indiĝena polico, estis la kaleŝoj kaj aŭtomobiloj de la Honolula aristokrataro. Sur la varfo la Reĝa Havaja Bando ludis *Aloha Oe*, kaj kiam ĝi finis, enŝipiĝinta korda orkestro el indiĝenaj muzikistoj ekludis la samajn ploreajn sonojn, la voĉo de la indiĝena kantistino birde soris super la instrumentoj kaj la bruoj de la foriro. Ĝi estis arĝenta anĉo, sonante ties klaran, nekonzufuzeban noton en la granda fonbruo de adiaŭo.

Antaŭe, sur la malalta ferdeko, malantaŭ la gardrelo staris ses vicoj de kakivestitaj junuloj kies bronzitaj vizaĝoj montris trijaran kampanjon sub la suno. Sed la adiaŭo ne estis por ili. Nek estis por la blankvestita ŝipestro, sur la alta turponto, remota kiel la steloj, rigardanta la tumulton sube. Nek estis la adiaŭo por la junaj oficiroj pli malantaŭe, revenintaj el la Filipinoj, nek por la blankvizaĝaj, klimatvelkitaj virinoj apude. Tuj malantaŭ la pasejo, sur la promenadferdeko, staris dudeko da usonaj senatanoj kun siaj edzinoj kaj filinoj — la senata ekskursogrupo kiu dum monato estis gastigita, supersatigita per statistikoj, trenita laŭ vulkana monto kaj lafovaloj por ekvidi la gloraĵojn kaj materialojn de Havajio. Estis la ekskursogrupo por kiu la transporta ŝipo alvenis al Honolulo, kaj estis la ekskursogrupo al kiu Honolulo adiaŭis.

La senatanoj estis girlanditaj kaj ornamitaj per floroj. La dika kolo kaj korpulenta brusto de Senatano Jeremio Sambrooke estis ŝarĝataj per deko de florkronoj. El tiu amaso da kronoj kaj floroj elstaris lia kapo kaj la plejparto de la freŝe sunbruligita kaj ŝvitanta vizaĝo. Li taksis la florojn abomenaĵo, kaj dum li rigardis super la homamaso sur la varfo per statistika okulo, kiu vidis neniom da beleco, sed taksis la laborpovon, la fabrikojn, la fervojojn, kaj la bienojn kiuj restis malantaŭ la homamaso kaj kiujn la homamaso esprimis. Li vidis materialojn kaj pripensis evoluon, kaj tro okupiĝis pri revoj de materiala atingo kaj imperio por rimarki sian filinon apude, parolantan kun junulo en eleganta somera kompleto kaj pajla ĉapelo, kies avidaj okuloj estis nur por ŝi

kaj neniam lasis ŝian vizaĝon. Se Senatano Jeremio rimarkus sian filinon, li vidus ke, anstataŭ la juna knabino dekkvinjara, kiun li portis al Havajio antaŭ nur unu monato, li nun forprenis kun si virinon.

Havajio havas maturigan klimaton, kaj Dorotea Sambrooke jam spertis ĝin sub aparte maturigaj cirkonstancoj. Svelta, pala, kun bluaj okuloj iomete lacaj pro legadi la paĝojn de libroj kaj klopodi trastumbli ĝis kompreno de la vivo — tia ŝi estis la pasintan monaton. Sed nun la okuloj estis varmaj anstataŭ lacaj, la vangoj estis tuŝitaj de la suno, kaj la korpo montris la unuajn indikojn kaj promeson de plenkreskantaj konturoj. Dum tiu monato ŝi lasis la librojn, ĉar ŝi trovis pli grandan ĝojon legante el la libro de la vivo. Ŝi rajdis ĉevalojn, ascendis vulkanojn, kaj lernis surfotabuladon. La tropikoj jam eniris ŝian sangon, kaj ŝi ardis pro la varmo kaj koloro kaj sunlumo. Kaj dum monato akompanis ŝin viro — Stefano Knight, atleto, surfotabulisto, bronzita dio de la maro, kiu mastris la kraŝantajndojn, saltis sur iliajn dorsojn, kaj rajdis ilin ĝis la plaĝo.

Dorotea Sambrooke ne konsciis la ŝanĝiĝon. Ŝia konscio estis ankoraŭ tiu de juna knabino, kaj ŝin surprizis kaj maltrankviligis la konduto de Stefano je ĉi tiu horo de adiaŭo. Ŝi lin konsideris sia kunludinto, kaj dum la monato li estis ŝia kunludinto; sed nun li ne adiaŭis kiel kunludinto. Jen li parolis ekscitite kaj malkontinue, jen li silentis. Kelkfoje li ne aŭdis kion ŝi diris, aŭ se li ja aŭdis, ne respondis kutimmaniere. Ŝin perturbis la maniero per kiu li rigardas ŝin. Ŝi ne sciis antaŭe ke li havas tiajn ardajn okulojn. Io en liaj okuloj ŝin timigegis. Ŝi ne povis ilin alfronti, kaj ŝiaj propraj okuloj ĉiam falis antaŭ ili. Sed estas ankaŭ io alloga en ili, kaj ŝi kontinue rerigardis por ekvidi tiun ardan, ordoneman, sopirantan ion, kiun ŝi neniam antaŭe vidis en homaj okuloj. Kaj ŝi mem estis strange mistifikita kaj ekscitita.

La fajfilego de la ŝipo elblovis surdige, kaj la florkronita homamaso impetis pli proksimen al la flanko de la doko. La fingroj de Dorotea Sambrooke ŝtopis la orelojn; kaj dum ŝi faris grimaceton pro la malagrabra ŝoko de bruego, ŝi rimarkis denove la ordoneman, sopirantan ardon en la okuloj de Stefano. Ŝin li ne rigardis, sed ŝiajn orelojn, delikate rozajn kaj travideblajn en la klinantaj radioj de la posttagmeza suno. Kurioze kaj fascinite, ŝi rigardis tiun strangan ion en liaj okuloj ĝis kiam li vidis

ke ŝi lin kaptis. Ŝi vidis liajn vangojn ruĝiĝi malhele, kaj aŭdis lin paroleti malkohere. Li estis embarasata, kaj ŝi mem konsciis embarason. Stevardoj nerveze iris tien kaj reen, petante al nevojaĝantaj homoj elŝipiĝi. Stefano etendis la manon. Kiam ŝi sentis la tuŝon de la fingroj kiuj jam milfoje tenis ŝiajn sur surfotabuloj kaj lafomontetoj, ŝi aŭdis la vortojn de la kanto per nova kompreno dum tiuj ploretis en la arĝenta gorĝo de la havaja kantistino:

*Ka halia ko aloha kai hiki mai,
Ke hone ae nei i ku'u manawa,
O oe no kan aloha
A loko e hana nei.*

Stefano jam instruis al ŝi la melodion kaj vortojn kaj signifon — tiel ŝi pensis, ĝis ĉi tiu momento; kaj je ĉi tiu momento de la lasta manpremo kaj varma kontakto de polmoj ŝi divenis unuafoje la veran signifon de la kanto. Ŝi apenaŭ vidis lin iri, nek povis lin rimarki sur la homplena pasejo, ĉar ŝi estis mergita en labirinto de memoroj, revivante la ĵus pasintajn kvar semajnojn, relegante okazojn en la lumo de rivelolo.

Kiam la senata ekskursogrupo alteriĝis, Stefano estis membro de la gastiga komitato. Estis li kiu prezentis al ili la unuan montradon de surfotabulado sur la strando Waikiki, pagajigante sian mallarĝan tabulon maren ĝis kiam li iĝis malaperanta peceto, kaj poste, subite reapante, leviĝante kiel mardio el la tumulto de ŝaŭmo kaj kirliĝanta blanko — rapide leviĝante pli kaj pli, ŝultroj kaj brusto kaj lumbo kaj kruroj, ĝis kiam li staris ekvilibrite sur la fumanta kresto de potenca, mejllonga ondegono, piedoj mergitaj en la fluganta ŝaŭmo, flugante stranden je la rapido de eksprestrajno, kaj paŝante trankvile sur la sablon ĉe iliaj surprizigitaj piedoj. Jen estis ŝia unua ekvido de Stefano. Li estis la plej juna ano de la komitato, junulo mem, dudekjaraĝa. Li ne distris per prelegfarado, nek brilis orname ĉe akceptoj. Estis en la ŝaŭmondoj de Waikiki, en la sovaĝa bovarpelo sur Manana Kea, kaj en la malsovaĝigejo de la Haleakala Ranĉo kie li prezentis sian parton de la distrado.

Al ŝi ne plaĉis la senfinaj statistikoj kaj eterna prelegfarado de la aliaj komitatoj. Nek al Stefano. Kaj estis kun Stefano ke ŝi ŝteliris for de la subĉiela bankedo ĉe Hamakua, kaj for de Abe Louisson, la kafbienegisto, kiu parolis pri kafo, kafo, nenio krom kafo, dum du fatalaj horoj. Estis tiam, dum ili rajdis inter la filikarboj, ke Stefano instruis al ŝi la vortojn de *Aloha Oe*, la kanto prezentita al la vizitantaj senatanoj je ĉiu eliro el ĉiu vilaĝo, ranĉo, kaj bienego.

Stefano kaj ŝi estis kune dekomence. Li estis ŝia kunludinto. Ŝi ekposedis lin dum ŝia patro okupiĝis pri la ekposedo de la statistikoj de la insula teritorio. Ŝi estis tro milda por tirani sian kunludanton, sed ŝi regis lin tute, escepte en kanuo, aŭ sur ĉevalo aŭ surfotabulo, je kiuj fojoj li ekkomandis kaj ŝi obeis. Kaj nun, je ĉi tiu

lasta kantado de la kanto, kiam la ŝnuroj estis malligitaj, kaj la granda ŝipo komencis retroiri malrapide de la doko, ŝi sciis ke Stefano estas al ŝi io pli ol kunludinto.

Kvin mil voĉoj kantadis *Aloha Oe*, — “Mia amo estu kun vi ĝis kiam ni renkontiĝos,” — kaj je tiu unua momento de amo konata ŝi eksciis ke ŝi kaj Stefano disŝiriĝas. Kiam ajn ili renkontiĝos? Tiujn vortojn li mem instruis al ŝi. Ŝi memoris sian aŭskultadon dum li kantadis kaj rekantadis ilin sub la haŭ arbo ĉe Waikiki. Ĉu estis profetaĵo? Kaj ŝi admiris lian kantadon, ŝi diris ke li kantis kun milte da esprimo. Ŝi ridis laŭte, histerie, je la memoro. Per tiom da esprimo! — kiam li estis elverŝanta sian koron per la voĉo. Ŝi sciis nun, kaj estis malfrue. Kial li ne parolis? Tiam ŝi ekkonsciis ke knabinoj de ŝia aĝo ne edziniĝas. Sed knabinoj de ŝia aĝo ja edziniĝas — en Havajio — ŝi tuj pensis. Havajio maturigis ŝin — Havajio, kie la karno estis ora kaj ĉiuj virinoj estas maturaj kaj sunkisitaj.

Vane ŝi trarigardis la densan homamason sur la doko. Kien li iris? Ŝi sentis ke ŝi povus pagi ajnan prezon por ekvidi lin nur unu fojon pli, kaj ŝi preskaŭ esperis ke iu mortiga malsano trafu la solan ŝipestron sur la turponto kaj prokrastu la foriron. La unuan fojon en la vivo, ŝi rigardis sian patron per kalkulema okulo, kaj farinte tiel ŝi notis per novega timo la liniojn de volo kaj rezoluteco. Estus terure kontraŭi lin. Kaj kiun ŝancon ŝi havus en tia lukto? Sed kial Stefano ne parolis? Nun estis malfrue. Kial li ne parolis sub la haŭ arbo ĉe Waikiki?

Tiam, kun granda sinkado de la koro, venis al ŝi ke ŝi sciis kial. Kion ŝi aŭdis iun tagon? Ho, jes, estis ĉe la tekunveno de Sinjorino Stanton, tiun posttagmezon kiam la sinjorinoj de la *Misiista Kliko* gastigis la sinjorinojn de la senata grupo. Estis Sinjorino Hodgkins, la alta blondulino, kiu demandis. La sceno revenis al ŝi brile — la larĝa lanai, la tropikaj floroj, la senbruaj aziaj servistoj, la zumo de la voĉoj de la multaj virinoj kaj la demando de Sinjorino Hodgkins en la grupo apud ŝi. Sinjorino Hodgkins loĝis fore sur la ĉeftero dum jaroj, kaj evidente demandis pri malnovaj amikoj de sia juneco. “Kio pri Sunjo Maydwell?” — estis ŝia demando. “Ho, ni neniam plu vidas ŝin; ŝi edziniĝis kun Vilĉjo Kupele”, — respondis alia insulogantino. Kaj la edzino de Senatano Behrend ridis kaj volis scii, kial edziniĝo influis la amikaron de Sunjo Maydwell.

— Hapa-haole, — estis la respondo; — li estis miksrasa, vi scias, ke ni de la Insuloj devas pensi pri niaj infanoj.

Dorotea turnis sin al la patro por pruvi sian supozon.

— Paĉjo, se Stefano iam venus al Usono, ĉu li ne povus veni kaj viziti nin?

— Kiu? Stefano?

— Jes, Stefano Knight — vi lin konas. Vi ĵus adiaŭis lin antaŭ nur kvin minutoj. Ĉu li, estante en Usono iun tagon, ne povus viziti nin?

— Certe ne, — Jeremio Sambrooke respondis bruske. — Stefano Knight estas hapa-haole kaj vi scias kion signifas tio.

— Ho, — Dorotea diris malforte, dum ŝi sentis malakran malesperon enŝteliĝi en la koron.

Stefano ne estis hapa-haole — ŝi sciis tion; sed ŝi ne sciis ke kvarona stamo da tropika sunlumo fluis en liaj vejnoj, kaj ŝi sciis ke tio sufiĉis por apartigi lin ekster la



edziĝolimo. Estis stranga mondo. Jen Lia Moŝto A. S. Cleghorn, kiu edziĝis kun malheleta princino de familio Kamehameha, sed la viroj konsideris honoro koni lin, kaj la plej ekskluzivaj virinoj de la ekskluzivega *Misiista Kliko* vidiĝis ĉe liaj tekunvenoj. Kaj jen Stefano. Neniu malaprobis ke li instruis al ŝi rajdi surfotabulon, nek ke li kondukis ŝin per la mano tra la danĝeraj lokoj de la kratero Kilauea. Li povis vespermanĝi kun ŝi kaj ŝia patro, danci kun ŝi, kaj esti membro de la gastiga komitato; sed ĉar estis tropika sunlumo en liaj vejnoj li ne povis edzinigi ŝin.

Kaj li ne montris ĝin. Nur dirite oni sciis. Kaj li estis tiel bonaspekta. La bildo de li formiĝis en ŝia imago, kaj antaŭ ol ŝi eksciis ŝi ĝojis pri la memoro de la gracio de lia belega korpo, de liaj grandiozaj ŝultroj, kaj de la povo ene de li, kiu ĵetis ŝin leĝere sur ĉevalon, portis ŝin sekure trans la tondraj ŝaŭmondoj, aŭ tiris ŝin per montbastono supren la severan laffirston de la Domo de la Suno. Ion pli subtilan kaj misteran ŝi memoris, kaj kiun eĉ tiam ŝi ĵus komencis kompreni — la aŭron de la maskla estaĵo kiu estas viro, tute viro, vireca viro. Ŝi ekkonsciis hontŝoke pri la pensoj kiujn ŝi havis. La vangoj koloriĝis per la varma sango, kiu rapide retiriĝis kaj lasis ilin palaj pro la penso ke ŝi neniam denove vidos lin. La steveno de la ŝipo estis jam en la fluo, kaj la ferdeko pasis apud la fino de la doko.

— Jen Stefano, — ŝia patro diris. — Mansvingu adiaŭe al li, Dorotea.

Stefano ŝin rigardis per avidaj okuloj, kaj li vidis en ŝia vizaĝo kion li antaŭe ne vidis. Pro la fluego de ĝojo al lia propra vizaĝo, ŝi sciis ke li scias. La kanto pulsadis en la aero:

Mia amo al vi.

Mia amo estu kun vi ĝis kiam ni renkontiĝos.

Ne necesas parolo por rakonti ilian historion. Ĉirkaŭ ŝi, pasaĝeroj ĵetadis siajn girlandojn al amikoj sur la doko. Stefano etendis siajn manojn kaj liaj okuloj petegis. Ŝi demetis sian propran girlandon, sed ĝi interplektiĝis kun la koliero de aziaj perloj, kiun Mervin, maljuna sukerreĝo, surmetis ĉirkaŭ ŝian kolon kiam li veturigis ŝin kaj ŝian patron al la ŝipo.

Ŝi baraktis kun la perloj alkroĉiĝintaj al la floroj. La ŝipo movadis pluen. Stefano jam estis sube. Jen la momento. Venontmomente li estos pasinta. Ŝi esploris, kaj Jeremio Sambrooke ekrigardis ŝin demandante.

— Dorotea! — li kriis akre.

Ŝi intence rompis la fadenon, kaj, meze de disŝutado de perloj, la floroj falis al la atendanta amanto. Ŝi rigardis lin, ĝis kiam la larmoj ŝin blindigis kaj ŝi enigis la vizaĝon al la ŝultro de Jeremio Sambrooke, kiu forgesis siajn amatajn statistikojn pro mirego pri knabinetoj kiuj insistas plenkreski. La homamaso daŭre kantadis, la kanto estis forfadanta en la distancon, sed ankoraŭ fandiĝanta per la sensama langvoro de Havajio, la vortoj mordantaj ŝian koron kiel acido pro ilia malvero.

*Aloha oe, Aloha oe, e ke onaona no ho ika lipo,
Ama brakumo, ahoi ae au, ĝis kiam ni renkontiĝos.*

Tradukis el la angla **Scott Page**

Pro ĉi tiu traduko Scott Page fariĝis laŭreato en la branĉo *Traduka prozo* en la konkurso *Liro-2008*.



Literatura konkurso Liro-2010

La Ondo de Esperanto denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso *Liro-2010*. Ĉi-jare estas proponitaj du originalaj kaj tri tradukaj branĉoj:

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Traduko el la angla lingvo: *The man who lived for others* de Jerome K. Jerome
4. Traduko el la franca lingvo: *L'ami Joseph* de Guy de Maupassant.
5. Traduko el la rusa lingvo: *Amerikanec* de Arkadij Averĉenko.

En la originalaj branĉoj (1, 2) oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj, en la tradukaj branĉoj (3, 4, 5) — nur per unu verko.

La originaloj de la tradukendaj tekstoj estas elŝuteblaj en la retejo de La Ondo de Esperanto: <http://www.esperanto.org/Ondo/Ind-liro.htm>

Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1a de decembro 2010.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso <sezonoj@yahoo.com>. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizanto ĝis la 1a de januaro 2013 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

Bonŝancon!

Halina Gorecka



Kiel akvo de l' rivero


Kiel akvo de l' rivero estas la plej signifa romano originale verkita en Esperanto de la franca aŭtoro Raymond Schwartz (1894–1973) kaj publikigita unuafoje en 1963. Ĉi tiu verko troviĝas sur la listo de bazaj legindaĵoj, kompilita de William Auld, kio interalie signifas, ke ĝia kono kaj kompreno estas deviga en Esperanto-kursoj kaj -ekzamenoj. La libro estis plurfoje reeldonita (Danlando 1977, Iltis 1987, Edistudio 1991).

Raymond Schwartz lernis Esperanton jam antaŭ la unua mondmilito, en 1912 li publikigis siajn unuajn poemojn kaj en 1913 fondis Esperanto-klubon en sia naskiĝurbo Metz. En 1920 Schwartz, kiu elpaŝis ankaŭ kiel humoristo-satiristo, fondis la Esperanto-kabaredon *La Verda Kato*, kiun li gvidis ĝis 1926, kaj en 1949 li retroviĝis inter la kunfondantoj de la grupo *Tri Koboldoj*, kiu ekzistis ĝis 1956. En 1933 li eldonis la satiran revuon *La Pirato*. Al liaj ĉefaj verkoj apartenas krome *Anni kaj Montmartre* (romaneto, 1930), *La Stranga Butiko* (poemoj, 1931), *La Ĝoja Podio* (poemoj, 1949), *Vole... Novele* (noveletoj, 1971), *Kun siaspeca spico* (eseoj, 1971).

Kiel akvo de l'rivero estas historia romano kun aŭtobiografiaj elementoj, kiu traktas la vivspertojn de juna franco Pierre Touchard, kiu vivas komence de la dudeka jarcento en Alsaco-Loreno, pli precize en Autrecourt, vilaĝo en la eksfranca provinco aneksita de Germanio post la milito de 1870/71, do en la kamparo sude de la urbo Metz, kie ankaŭ la romanaŭtoro Schwartz mem havas siajn radikojn.

Post la nekutima geedziĝfesto de la pli aĝa frato, Pierre forlasas sian familion por konatiĝi kun la vasta mondo. Tra Parizo, kie li partoprenas en adiaŭna festeno de abiturientoj, li trafas Berlinon, kie lin volonte akceptas iu familio Geist, kie regas la ordema prusa reĝimo, Pierre perfektigas sian germanan scipovon kaj eĉ laboretas per franclingva instruado. Lia aperta karaktero permesas renkonti multajn novajn geamikojn, precipe junaĝajn. Neeviteble aldoniĝas amaj aventuroj kun iuj damoj kaj fraŭlinoj, dum kun la burŝoj trejniĝas sofistikaĵoj kaj ekzerciĝadas ekscesaj studentaj ceremonioj kiel la arto trinki bieron.

Kiel franco en Berlino Pierre estas preskaŭ ekzotulo, sed ŝajnas, ke li pli kaj



pli forgesas sian traŭmaton vekitan pro la specialaj sentoj akiritaj en la limzono, kie ambaŭflanke vivas parencoj, kiuj bone scias kion limo signifas. Meze de la amuza berlina diboĉado kaj senzorga bonvivado subite eksplodas la Granda Milito (t.e. la unua mondmilito), la idilio de la Kaiser-epoko rompiĝas, Germanio kaj Francio estis puŝitaj en la militon kaj Pierre fuĝas el Berlino, dum li ankoraŭ sigelas la reciprokajn kaj eternajn amon kun Annemarie, kaj reiras hejmen al Alsaco-Loreno, en la fifaman limzonon, kie li konatiĝos kun alispecaj spertoj — tiuj kun la milito. La fadeno ŝiriĝas kaj nia protagonisto reaperas dudek jarojn poste, kiam eksplodas nova milito, kiun li devas partopreni en soldata uniformo, kvankam kontraŭ sia propra volo.

En ĉio tio Pierre devas lerni, ke vide al la sorto la homo estas tute malgrava estaĵo, fakte nur guteto en la akvo de l'rivero, kiu ne mem elektas la propran fluadon, kaj neniu povas iri kontraŭ la fluado... Komenciĝas la pri- kaj kontraŭmilita filozofio. La amrakonto finiĝas tiel, ke Pierre revidas en Marsejlo, kie sub la pseŭdonomo Bouchardelle li partoprenas la rezistan movadon, Annemarie Balkenwirth, nuntempe sinjorinon Bastrow, pri kiu mankis al li informoj dum longaj tri jardekoj, kaj kiu havas filon, kiu estas ankaŭ la filo de Pierre. Kiel Pierre ankaŭ ŝi konfliktis kun la nova politika reĝimo kaj fuĝis de ĝi al suda Francio. Malfeliĉe, Annemarie estas kaptita de Gestapo, dum ŝia propra filo, kiu estas ĝisosta nazio, organizas ŝian ekspedon en la koncentrejon, kie ŝi pluvivas. Kaj post nova paso de jaregoj Pierre kaj Paul, patro kaj filo, renkontos ŝin en mizerula hospitalo, kie ŝi laboras kiel flegistino.

Pli malpli detalajn recenzojn aperigis inter alie Edward Ockey en *Esperanto* (11/1963), Poul Thorsen en *Norda Prismo* (4/1963), Oldřich Kníchal en *Panoramo/Starto* (1980), William Auld en sia *Enkonduko en la originalan literaturon de Esperanto* (1979), kaj kompreneble ankaŭ Geoffrey Sutton mencias ĝin plurloke en sia brilega anglalingva literatur-enciklopedio de la jaro 2008.

Kiam la romano *Kiel akvo de l'rivero* reaperis en 1991 ĉe *Edistutio*, Sten Johansson relegis ĝin kaj verkis atentindan kompozician strukturkritikon. Laŭ la opinio de la svedo la plej sukcesa parto de la romano de Schwartz estas la komenca epizodo, kiu ludas en Loreno: “Jen oni rimarkas, ke Schwartz estis en sia hejma medio. Lia humuro aldonas tre plaĉan spicon al bona kaj suka sceno el iama vilaĝa vivo”. Laŭ la recenzanto ankaŭ la rakonto pri Berlino estas plejparte bona kaj interesa, tamen oni tie rimarkas, ke kvankam la aŭtoro ja konis la medion, tamen ĝi ne estis vere lia propra: “Ĉi tie en Berlino Schwartz farĉas la rakonton per sterilaj vortludoj, kio post nelonge iĝas terure teda, kvankam li prezentas ilin kiel la ĵargonon de iuj rolantoj en la rakonto”. Poste oni saltas trans dudek kvin jarojn ĝis la komenco de la nova milito, la dua mondmilito, kaj tiu ĉi drasta salto tamen kaŭzas al la aŭtoro iom da problemoj por konstrui kredindan intrigon, sed ankaŭ tion li mastras pli-malpli kontentige, konkludis la recenzanto. En la lasta kvarono de la verko komenciĝas ĝiaj gravaj mankoj, Johansson taksis, ĉar temas pri la problemoj kiel kunnodi ĉiujn fadenojn: “Schwartz tre domaĝe faras tion per serio da ekstreme malprobablaj koincidoj [sekvas ekzemploj, — A.K.]. La lasta kaj plej draste stulta de tiuj koincidoj okazas nur tri paĝojn antaŭ la librofino. Oni vere sentas, ke Schwartz post ege ambicia kaj lerta laboro jam plene malesperis pri kiel fini ĝin, kaj fatale decidis fini ĝin tuj, je ĉiu ajn kosto”.

Sed malgraŭ tiu malsukcesa fino, *Kiel akvo de l'rivero* restas laŭ Sten Johansson grava, interesa kaj legebla kun granda ĝuo: “Ĝi havas tiom da bonaj ecoj, belajn, detaliĉajn kaj buntajn priskribojn kaj scenojn el malsamaj medioj, ankaŭ ĉarman etoson el la epoko antaŭmondmilita. Ĝia temo devus esti plej grava al ĉiu esperantisto. Kaj ĝia lingvaĵo estas tutsimple modela. Legu ĝin!”

Andreas Künzli

Poemoj de Miĥail Lermontov

Kutime en la *Rusa Antologio* ni kelkfaze skizas la vivon kaj kreadon de ĉiu prezentata poeto, sed, same kiel en la kazo de Puŝkin, estus strange memorigi la vivojarojn kaj la ĉefajn verkojn de **Miĥail Júrjeviĉ Lérmontov**. Ni nur menciu, ke fine de la 1980aj jaroj, post kolekto de antaŭmendoj en la tuta Sovetunio, oni eldonis lian duvoluman verkaron (1424 paĝoj) en la fantasta eldonkvanto 14.000.000 ekzempleroj. Legu kelkajn el liaj plej popularaj versaĵoj en novaj tradukoj de Valentin Melnikov.



AL STULTA BELULINO

*Amur' demandis min iame,
Ĉu min allogas lia vin' –
Mi tiam ne soifis ame,
Sed trinkis ĉiom, ĝis la fin'.*

*Nun vane mi estingi penas
Soifon de brulanta buŝ' –
Pokalo de l' pasi' malplenas,
Samkiel via kapo-fuŝ'.*

STANCOJ

*Per menso atentinte re
La ĉenon, kiu l' vivon ligis, –
Mi ne sopiras pri l' pase':
Ĝi min neniom kontentigis.*

*Al ĝi, samkiel al nun-est',
verŝiĝis de pasioj ŝpruco,
Surŝutis ĝin malic-tempest'
Samkiel neĝ' sur stepa kruco.*

*Respondon al la sento-flam'
Ne trovis la soif' anima,
Kaj se mi kantas pri la am' –
Ŝi estis mia rev' intima.*

*Al mi, samkiel meteor',
Brilinte en mallum' vespera,
Ŝi estis ĉio por la kor',
Kaj trompis, kiel ĉio tera.*

KIAL

*Mi tristas, ĉar mi amas vin, kaj scias nun,
Ke misas sorto por floranta via jun' –
Ja ne indulgos ĝin monduma klaĉ' turmenta.
Pro ĉiu hela tag', aŭ pro dolĉec' momenta
Per larmoj kaj sopir' vi pagos al destin'.
Mi tristas... ĉar gajeco ne forlasas vin.*

ENUO KAJ TRISTO

*Enuo kaj tristo, sen mano amika. Sopir'
En hor' de anima malhelo...
Deziroj!.. ĉu indas eterna kaj vana dezir'?.
Kaj jaroj forpasas – plej bonaj, sen celo!
Ĉu ami... Sed kiun? Portempe – sensencas la pen',
Kaj ami eterne ne eblas.
Rigardi en sin? Ĉio pasis, kaj regas malplen':
Kaj ĝoj', kaj turmentoj, kaj ĉio tro feblas...
Pasioj? Sed frue aŭ tarde la dolĉa dolor'
Degelos pro vort' de racio;
Kaj viv', esplorita kun frida atenta rigor' –
Ja estas nur ŝerco sen sprit', plu nenio...*

Tradukis el la rusa **Valentin Melnikov**

Ankaŭ infano estas homo



Korczak, Janusz. *Reguloj de vivo* / Tradukis el la pola Tomasz Chmielik. — Czeladź: Hejme; Świdnik: Libro-Mondo, 2009. — 95 p.

Korczak, Janusz. *Reĝo Maĉjo la Unua* / Tradukis el la pola Tomasz Chmielik. — Świdnik: [Tomasz Chmielik], 2009. — 176 p.; il.

En Varsovio en la juda tombejo estas monumento: maljuna viro, ĉirkaŭata de infanoj, tenas sur la brakoj la plej malgrandan knabeton.

La monumento estas dediĉita al Janusz Korczak (lia vera nomo estas Henryk Goldŝmit), kuracisto kaj edukisto, dum lia lasta en la vivo vojo al la gasĉambro en Treblinko. Inter la 5a kaj la 8a de aŭgusto 1942 li iris kun siaj edukatoj al vagonaro, forportonta ĉirkaŭ



4000 infanojn kun edukistoj el ĉiuj orfejoj al Treblinko, ĉar li ne povis fari aliel. Li ne povis lasi siajn gelernantojn en malfacilaj minutoj.

Tio okazis al Janusz Korczak tute nature, ja li ekde la infanaĝo estis Homo, ne estonta kaj ne edukonta, sed nuna Homo, kiu mem se ĝuste ne sciis, do li multe pripensis, kio estas bono kaj kio estas malbono, kaj serĉis vojon, kion fari, ke ĉiuj homoj, precipe infanoj, vivu en bono. Li jam tiam sciis, ke en la vivo, bedaŭrinde, ne ĉiam bono venkas malbonon. La vivo ne ĉiam estas justa, kiel ni volus. Iam okazas maljusto.

Plejparte la vivo maljustas al neplenkreskaj homoj, kiujn multaj plenkreskuloj traktas kiel ulojn, kiuj ne rajtas mem deziri, voli, scii ion, pensi pri io, fari ion sen permeso de plenkreskuloj. Se plenkreskuloj ion malpermesas al infanoj sen klarigo kaj sen atenti la kaŭzon de infanaj deziroj, do, la infanoj ne faros la malpermesitan dum infanaĝo, sed havos kaŝitajn revojn fari tion, kiam ili elkreskos. Krom tio la infano al kutimiĝas ne respondi pri siaj agoj, ĉar li (ŝi) uzas ne la propran konscion, sed permeson de plenkreskuloj.

Janusz Korczak estas aŭtoro de kelkaj sciencaj traktaĵoj pri pedagogio, inter kiuj estas la libro *Reguloj de vivo*, tradukita al Esperanto de Tomasz Chmielik. En ĝi la aŭtoro ne donas pretajn receptojn aŭ postulojn de tio, kion devas fari edukantoj aŭ edukatoj, sed proponas al sia leganto memstare trovi eliron el certa problemo kaj vidi la situacion ambaŭflanke — de plenkreskulo, kiu edukas, kaj de infano, kiu estas edukata. La libro konsistas el ĉapitroj, kies nomoj mem diras pri la enhavo: *Kiuj estas plej proksimaj, Domo — hejmo, Plenkreskuloj hejme, Korto — ĝardeno, Strato, Lernejo, Distroj, Riĉa — malriĉa, Pensoj — sentoj, Sano, Kapabloj, Agrabla — malagrabla, Avantagoj — malavantagoj, Knaboj — knabinoj, Pasinteco — estonteco*. Tra la tuta libro trairas la ĉefa penso de la aŭtoro — neplenkreskulo estas la sama homo kiel plenkreskulo, nur li (ŝi) ne povas vortumi siajn pensojn kaj ne havas ankoraŭ sufiĉan vivosperton. Ne hazarde enkadrigas la libron *Antaŭparolo* kaj *Tri aldonoj al ĉi tiu libro*, en kiuj tiu penso estas eldirita pli forte kun la plej elstaraj ekzemploj el lia pedagogia agado.

La dua speco de verkoj de Janusz Korczak estas beletraĵoj. Ĉiuj ili prezentas la mondon de neplenkreskuloj. Ni foliumu la romanon *Reĝo Maĉjo la*

Unua, tradukita de la sama Tomasz Chmielik. En tiu romano la aŭtoro rakontis pri siaj infanaj pensoj, pri tio, kion li mem volis efektiviĝi ekde la infanaĝo. Reĝa filo Maĉjo orfiĝis en tre juna aĝo. Li poiomete komencis kompreni, kiel malfacile estas regi la landon. En la libro estas multe da aventuroj de la juna heroo, sed pli multe da liaj pensoj pri gravaĵoj, sen kiuj la vivo entute kaj precipe la infana vivo ne estus feliĉa. Maĉjo faras reformojn, kiujn mem Korczak volis fari en sia infanaĝo. Li organizis Infanan seĝmon (parlamenton), kiu okupiĝas pri demandoj, ligitaj kun malplenkreskuloj, Infanan gazeton, kiu informis ĉiujn infanojn pri novaĵoj en la seĝmo kaj en la infana medio. Certe, ne ĉio estis sukcesa, ĉar tio estis la unua sperto en tiu sfero. La vivo ne estas fabelo. Ni volas, ke ĉiu komprenu, ke la homoj povus esti feliĉaj, se ili subtenus ĝustajn infanajn revojn. Sed fine tio okazas nek en la romano, nek en la vivo de Janusz Korczak. En la realo tiu sistemo, pri kiu pensis la edukisto, post multaj jaroj estis kreita de li en orfejoj, kie estis kaj propra informtabulo, kaj leterkesto, kaj infangazeto, kaj komunaj kunsidoj kun infanoj, kaj komuna deĵorado, kaj infana tribunalo. Sed denove ĉion forstrekis la milito.

Mi ne scias, ĉu ekzistas Esperanto-traduko de alia romano de Janusz Korczak, *Reĝo Maĉjo sur insulo senhoma*, ĉar al mi tiu heroo estas tre simpatia kaj mi volus denove renkontiĝi kun li en la daŭrigo de la libro.

Tomasz Chmielik faris grandan kaj gravan laboron per la traduko de la libroj. Certe, kaj plenkreskuloj — edukistoj kaj simplaj homoj — kaj neplenkreskuloj ricevos ne tiom plezuron pro legado de la libroj, kiom eblecon vidi la mondon de infanoj de alia flanko kaj pripensi multon en niaj interrilatoj kun infanoj. Des pli ke la libroj estas bele eldonitaj kun ilustraĵoj el infanaj pentraĵoj (*Reĝo Maĉjo la Unua*) kaj fotoj (ambaŭ eldonaĵoj).

Irina Mironova
doktoro pri pedagogio


La Ondo partoprenos

26 jun – 4 jul 2010
46aj Baltiaj Esperanto-Tagoj
en Visaginas (Litovio).

1 – 7 jul 2010
FREŜO
en Olsztyn (Pollando).

Internacia Fotokonkurso de “La Ondo”

Post dek du sukcesaj konkursoj (1998–2009) la redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la 13a Internacia Fotokonkurso.



Rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj, senditaj elektronike, ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La fotoj devos atingi la sekretarion de la konkurso antaŭ la 1a de decembro 2010.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2011.
2. 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2011.
3. abono de *La Ondo de Esperanto* en 2011.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto*) por la plej bona foto pri la temo *Familio*.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en *La Ondo de Esperanto*. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 1a de januaro 2012 ekskluzivan rajton uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-rajton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

Halina Gorecka

Ricevitaj libroj

Franko, Ivan. [*Elektitaj verkoj*] / Komp., antaŭpar. Viktor Pajuk; Trad. el la ukraina Mikaelo Bronŝtejn, Andreo Rogov, Sergeo Zikejev, Nikolaj Danovskij, Nadija Andrianova-Hordijenko, Aleksandr Koroleviĉ, Marina Aleksejeva, Denteto. — Lucjko: Надстир'я, 2008. — 80 p.; 250 ekz. — (La biblioteko de “Helianto”; Vol. 1). — [Donaco de Anatolij Sidorov].

Korczak, Janusz. *Reĝo Maĉjo la Unua* / Trad. el la pola Tomasz Chmielik. — Świdnik: [Tomasz Chmielik], 2009. — 176 p.; il. — [Recenzoekzempler].

Korczak, Janusz. *Reguloj de vivo* / Trad. el la pola Tomasz Chmielik. — Czeladź: Hejme; Świdnik: Libro-Mondo, 2009. — 95 p. — [Recenzoekzempler].

Vidman, Čestmír. *Sedmnáct slabik = Dek sep silaboj*: [Dulingva poemaro] / Komp., trad. el la ĉeĥa Jaroslav Krolupper; Postpar. M. Turková — Praha: Petr Dvořák, 2009. — 86 p., il.; 400 ekz. — [Donaco de Jiří Patera].

Vondroušková, Lubov. *Iluzio = Иллюзия*: [Dulingva poemaro] / Trad. el la rusa Jaroslav Krolupper; Postpar. Ivo Pospíšil. — Brno: Onufrius, 2009. — 60 p., il. — [Recenzoekzempler].

Линцбах, Яков Иванович. *Принципы философского языка: Опыт точного языкознания* / Закл. ст. И.И. Ревзина. Изд. 2-е, доп. — М.: Книжный дом “ЛИБРОКОМ”, 2009. — 248 с. — (История лингвофилософской мысли). — [Donaco de Tatjana Korĵenkova].

Ricevitaj gazetoj

Bulteno de Esperantista Klubo en Praha, 2010/1; EAB Update, 2010/49; Esperanta Finnlando, 2010/2; Esperanto, 2010/4; Esperanto aktuell, 2010/2; Esperanto en Danio, 2010/2; Gazeto Esperanto, 2010/72; Ĝenerala Informilo, 2010/160; Heroldo de Esperanto, 2010/3,5; Homarane, 2010/1; Juna Amiko, 2009/3; KAE-Informilo, 2010/70; Konstru-Forumo, 2010/20; Kontakto, 2010/1; La Gazeto, 2010/147; La Ondo de Esperanto, 2010/5; La Revuo Orienta, 2010/3; Le Monde de l'Espéranto, 2010/573; Monato, 2010/5; Okazas, 2010/573; REGo, 2010/2; Svisa Esperanto-Societo Informas, 2010/2.

Gazetoj

Konstru-Forumo, 2010, №20

Konstru-Forumo estas diskuta kontaktilo de la internacia grupo de konstrufakuloj, kiun gvidas Jan Werner. Ĝi celas serĉi kaj trakti fakajn nociojn, kiuj restas en Esperanto ankoraŭ sen nomindiko. Tio ne eblas sen konsiderado de la reguloj vortfaraj, gramatikaj, semantikaj, sintaksaj. Tial estiĝas diskutoj ne rekte rilataj al la celo de KF, en la 20a kajereto estas resumata diskuto pri “po”.

Bronislav Ĉupin, Rémy Bouchet, Fabien van Mook kaj Jan Werner kontribuas al traktado de terminoj el la *Hidraŭtika-sanitara terminaro* de Félix García Blázquez. Ĉeestas regula rubriko *Ni solvas termin-vakaĵojn*, ĉi-foje pri *taluso*.

Jan Werner prezentas ok bazajn nociojn el la fako “kanalizado”.

Fine Jan Werner opinias, ke “estus utile, se nia modesta, sed pozitiva kontribuo sur la kampo de konstrufako kaj fakoj parencaj, estus sekvata ankaŭ de aliaj profesiuloj”.

Fakuloj el diversaj segmentoj de konstrufako, arĥitekturo kaj koneksaj fakoj kaj metioj estas bonvenaj al la *Konstru-Forumo* ✉ Jan Werner, Dřínová 18, CZ-61200 Brno, ✉ wernerjan@seznam.cz.

Halina Gorecka

BibLO: gazetrikolto 2009

La Biblioteko de *La Ondo* (BibLO) ricevis 270 kajerojn de 57 periodaĵoj, kiuj estis eldonitaj en 2009.

La plej ofta estas *Heroldo de Esperanto* — 17 numeroj jare. Entute la gazetoj venis el 24 landoj: sep el Francio, kvin el Nederlando (nur unu aperas ekster UEA), po kvar el Hispanio, Pollando, Ruslando kaj Svislando (krom unu, ĉiuj de LF-koop).

Monato
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Sendependa internacia revuo en Esperanto kun legantoj en 65 landoj!

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

www.monato.net

Flandra Esperanto-Ligo
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen
monato@fel.esperanto.be

6	1	3	4	7	8	2	5	9
7	2	8	5	1	9	4	6	3
4	5	9	6	3	2	8	7	1
2	6	1	9	4	7	3	8	5
9	3	5	1	8	6	7	2	4
8	7	4	2	5	3	1	9	6
1	9	6	7	2	4	5	3	8
5	8	2	3	9	1	6	4	7
3	4	7	8	6	5	9	1	2

Dek du respondoj venis al la aprila *Sudoku*, krom unu, ĉiuj ĝustaj. Ilin sendis: Jindřich Tomíšek (Ĉeĥio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio), Rainer Haupt, Edeltraut Henning, Gunter Neue, Horst Vogt (Germanio), Hanna Skalska, Zbigniew Tytkowski (Pollando), Svetlana Kon-

jašova (Ruslando), Roland Larsson (Svedio).

La libropremion ricevas **Edeltraut Henning**. Ni gratulas!

La ĝustan solvon vidu ĉi-apude.

Juda humuro

Li ridos nur hejme

Kelkaj judoj sidis en gastejo, rakontis ŝercojn kaj multe ridis.

Kiam Berl rakontis sian ŝercon, ĉiuj ĉeestantoj ridis, escepte de Pinje.

Oni demandis lin: “Kial vi ne ridas?”

Pinje respondis: “Mi estas en kverelo kun Berl kaj tial mi ridos hejme”.

Volas/povas

Abrahamo: “Kalman, ĉu vi volas pruntedoni al mi 100 florenojn?”

Kalman: “Jes, mi volas, sed ne povas”.

Abrahamo: “Do eble vi povas prunti al mi 10?”

Kalman: “Tio estas alia afero. Tion ĉi mi povas fari, sed ne volas”.

El la kolekto de **Josi Ŝemer**

Diagonaloj

De supre dekstren: 1. Planedo inter Merkuro kaj Tero; 2. Karta ludo; 3. = Stela; 4. = Ĉambristo; 5. La ĉefurbo de Kubo; 6. Korda muzikinstrumento; 7. = Citronujo; 8. La plej granda oceana ondo; 9. = Reputacio; 10. Rodbesto (skribu inverse); 12. Saltanta besto kun nuda haŭto.

De supre maldekstren: 2. ... lango ne flatas, ... mano batas; 3. Muzika verkado; 4. La plej eta lamo; 5. En la helena mitologio: subtera regno de mortintoj; 6. Bagna ŝipo; 7. Provizi; 8. Eltirajo; 9. Loĝanto de orienteŭropa lando; 10. Vira voĉo; 11. Suda frukto; 13. La ĉefurbo de Italio.

Ĉiuj vortoj estas radik-vortoj. La solvoj venu al la redakcio antaŭ la 1a de aŭgusto.

Kompilis **Viktor Alikin**

Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

Ĉiuj eroj venas el *Libera Folio*, kaj tial necesas meti www.liberafolio.org/ antaŭ ĉiujn adresojn.

UEA en peza dormo

... tiun rezulton sekve decas diskutigi al komato-listo kaj uea-membroj. (Petr Chrdle, 2010/petr-chrdle-ne-alstrebas-estraran-postenon#1269188006, 21 mar; rimarkis, en *Libera Folio* mem, Jens Stengaard Larsen)

UEA sur pava vojo

Sole Esperanto ne sufiĉus por apliki la lingvon internacie, dankon al UEA pro ĝiaj sukcesoj, pro pavumado de la vojoj por internacia komunikado kaj interkompreno. (Slavik Ivanov: Mi ne membrus en tia UEA, 2010/universala-kongreso-2012-okazos-en-vjetnamio/#1265061997, 1 feb)

Ecce homo!

Mi konas Osmon, mi konas Giorgion SILFER: mi asertu al vi, ke ili estas homoj sed laborkampe Silfer estas multe pli bona. (Gbelo Koffi: Jam pasis la tempo kiam Afrika Agado atendis ĉion de la ekstero, 2010/jukka-pietilaainen-ne-vidas-grandajn-problemojn-en-uea#1268934895, 18 mar)

Barbara “...aspektas vere monumenta...”

Barbara Pietrzak estas plenmerita institucio de la Esperanto-movado. (Dario Rodriguez, 2010/esperantistoj-ellaboras-european-patriotismom/#1267098168, 25 feb)


Ekscit-malnudigo, aŭ: Robuja ĵurnalismo

... oni montru al la klientoj, kiom “liberaj” oni estas per atakoj al la gravuloj, per pompe nomataj investigadoj (Marc Bavant: Respekta ĵurnalismo, 2008/aktualeo/#1217664724; rimarkis Kalle Kniivilä)

Minimuma distingo, aŭ: Forturni sin de tru'

Ĉe la kritiko el la propraj vicoj, minimume devus esti distingita inter la problemoj de la europa idealismo kiel la lulilo de ideologioj kaj jam el la origino de esperanto disradiata dialogika kompeniĝemo. La unua nenion havas komunan kun la alia kaj ankaŭ ne estas kontraŭaj (kiel eble ŝajnus), sed la dua povas helpi por la unua en la sia, en si mem detruturniteco. (Eugen Macko: Kio devus esti komprenebla?, 2010/esperanto-kaj-europa-unio-cu-mirago-cu-perspektivo/#1263596654, 16 jan)

Plukis Istvan Ertl



Venu 51 la
Esperantista Kulturdomo
Grésillon

www.gresillon.org
M.C.E., kastelo Grésillon, 49150 BAUGÉ, Francujo

SES 2010

Somera Esperanto-Studado

02.07.-10.07.2010, Piešťany, Slovakio

Tria renkontiĝo de lernu! - uzantoj

Kio atendas vin?:

elstaraj Instrulstoj, agrabla loko, bonega etoso, ekskursoj, sportumado, reto senpage, koncertoj, prelegoj, diskutoj, filmoj, vin-gustumado...

Specialaj ĉi-fojaj programoj:

KER-ekzamenoj (nivele B1,B2,C1)

TEJO-seminario „Instigi kreemon“

ILEI+E@I seminario „Flugiloj de malfacila vento“

Pli da informoj: www.lernu.net aŭ ses@lernu.net



http://eo.lernu.net/prj_lernu/renkontigoj/SES/index.php



Pollando. La inaŭguro de la Esperanto-Biblioteko en la naskiĝurbo de Zamenhof (vd. p. 5): en la memorlibro skribas Tomasz Makowski, la direktoro de la Nacia Biblioteko de Pollando; staras Jacek Piorunek, membro de la Estraro de la Podlahia Vojevodio kaj Ela Karczewska. (*Robert Kamiński*)



Ĉinio. En la sidejo de la Esperanto-Asocio de Kantono la 17an de aprilo oni rememoris d-ron Zamenhof okaze de la 93a datreveno de lia forpaso. Kelkaj samideanoj parolis pri Zamenhof kaj pri lia laboro por la bono de la homaro. Fine, en vere amikeca kaj agrabla etoso, ĉiuj bankedetis. (*Augusto Casquero*)



Hungario. La tradicia Junulara Esperanto-Renkontiĝo de la Hungara Esperanto-Junularo, okazinta 26–28 mar en Tiszafüred, ebligis al la kunvenintoj kursojn kaj ekskursojn, dancolernadon, manlaboradon, ludojn, gustumadon de frandaĵoj kaj pafadon per tradiciaj hungaraj sagoj. (*Julianna Vas-Szegedi*)

HISTORIO

DE ESPERANTO



Verkita de Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 5

Aleksander Korĵenkov. *Historio de Esperanto*
Serio *Scio*, Volumo 5
128 paĝoj, 12 eŭroj

Mi estas homo



Originalaj verkoj de
d-ro L.-L. Zamenhof

Serio *Scio*. Volumo 6

L.-L. Zamenhof. *Mi estas homo*
Serio *Scio*, Volumo 6
288 paĝoj, 24 eŭroj

HOMARANO

La vivo, verkoj kaj ideoj
de d-ro L.L. Zamenhof



Aleksander Korĵenkov

Serio *Scio*. Volumo 8

Aleksander Korĵenkov. *Homarano*
Serio *Scio*, Volumo 8
320 paĝoj, 27 eŭroj

Aleksander Korĵenkov



ZAMENHOFOLOGIO

Aktualaj problemoj kaj taskoj

Aleksander Korĵenkov. *Zamenhofologio*
Serio *Sed ne el katedro*, Volumo 5
16 paĝoj, 3 eŭroj

Mendu en via kutima libroservo